

ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN-1565 3315



Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

Astrobiologio kaj vivo ekstertera


Dokumenta filmo pri Zamenhof

**La 17-a Israela Esperanto-Kongreso
kaj posta ekskurso: spertoj de
hispano, svisino kaj belgo**


Epopea Memorlibro pri Josi Ŝemer

La vivo kaj memoroj
de amata esperantisto, Josi Ŝemer,
kiu dediĉis sin al Esperantujo
en Israelo kaj tutmonde.

La libro reflektas bildon de la israela
kaj internacia Esperanto-komunumo.
Ĝi enhavas dekojn da liaj artikoloj,
verkitaj dum kvar jardekoj, kaj plenan
kolekton de liaj famaj judaj ŝercoj kaj anekdotoj,
kolektitaj kaj senditaj dum jaroj
al centoj da samideanoj tutmonde.




Josef Ŝemer • 1950-2012



Josef Ŝemer
1950-2012

Koro de la Israela Esperanto-movado
amata tra la mondo

Esperanto-Ligo en Israelo 2016
Redaktis: Amri Wandel



Redaktoro Amri Wandel
Provlegantoj Gabi Zeevi
Eldad Salzman
ELI-Prezidanto Amri Wandel

Redakcia adreso
P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo
eli@esperanto.org.il



Karaj legantoj,

Anstataŭ la somera numero de jarkolekto 2016 vi ricevis kiel ekster-serian numeron la epopean memorlibron por Josi Ŝemer, pli ol 400 paĝa. Dorse de tiu ĉi duobla numero troviĝas ĝia historio. Ankaŭ ĉe la fino estas la nekrologo de nia plej aĝa membro Teddy Lovenkopf, kiu forpasis pasintmonate. Krome vi trovos tri artikolojn pri la pasintjaraj Israela Kongreso kaj postkongreso, la filmo-skripton de dokumenta filmo pri Zamenhof planita okaze de la 100-a datreveno de lia forpaso, recenzon de kortuŝa libro pri la holokaŭsto kaj pli. Agrablan legadon, *Amri*

Retejo: <http://esperanto.org.il/ie.html>
Fondita 1959 kiel *Nia Ligilo*

Enpaĝigo: A. Wandel

Fotoj: A. Wandel, krom en la artikoloj de *Carlos Spinola* kaj *Jael Ŝelaĥ*, kie fotis la verkistoj

Kovrilo: Filmo pri Zamenhof (p.36) kaj la Memorlibro pri Josi Ŝemer (p. 46).

Abontarifo eksterlanda:
10 EUR. Eblas pagi per UEA-konto *elia-q* aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Enhavo

- 3 Esperanto-agado en Israelo dum 2016; Jubilea Zamenhofa Vespero
5 Astrobiologio kaj vivo ekstertera *A. Wandel*
12 La 17-a Israela Kongreso, Jafo *Carlos Spinola*
18 Mia Israela Kongreso..... *Nelly Krasniqi*
27 Mia vojaĝo al Israelo 2016 *Georges Sosouis*
34 Spertoj de la Universala Kongreso en Nitra *Jael Ŝelaĥ*
36 Dokumenta Filmo pri Zamenhof - *Parto I*..... *Zachi Schiff*
38 Recenzo pri "Taglibro de mia frato"..... *Luiza Carol*
42 Ni funebras: Teddy Lowenkopf..... *A. Wandel*
47 Memorlibro por Josi Ŝemer..... *A. Wandel*

Esperanto-agado en Israelo dum 2016

Aprilo 50 personoj partoprenis en la 17-a Israela Kongreso en Jafo, 7 eksterlandanoj, koncertis Kajto. Kiel kutime okazis antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj por la eksterlandanoj. Vidu p. 12-33.

Junio ELI eldonis 400-paĝan Memorlibron pri Josi Ŝemer. Vidu p. 47.

Julio Post kvardek-jara funkciado en Bikurej Haitim, la Tel-Aviva klubo translokiĝis al la nova klubejo en WIZO.

Julio Dekdu israelanoj partoprenis en la 101a Universala Kongreso en Nitra. Vidu artikolon sur paĝo 36.

Aŭgusto pli ol 30 s-anoj ĉeestis en la somerfina renkontiĝo en Kafe-Kafe.

Decembro ĉ. 50 s-anoj kaj gastoj partoprenis la Zamenhofan Feston



Enrica kantas en la Zamenhofa Festo en Tel-Avivo

Zamenhofa Festo en Tel-Avivo

A.Wandel

Aperis en la revuo Esperanto, decembro 2016

Malgraŭ la pluvo kaj malvarmo, ĉ. 50 personoj partoprenis la Zamenhofan Feston en Tel-Avivo. Unuafoje la evento okazas en la nova klubejo, en la maljunulejo WIZO. Responde al nia invito venis pli ol dek gastoj el inter ĝiaj loĝantoj, kaj sekve ni iom klarigis hebree pri E-o kaj partojn de la

programo. Fotoj videblas en la retligo <https://plus.google.com/photos/105030054444214202226/albums/6366040298293095601>

La arta programo, kiel ĉiam, organizita de Matilda, inkludis kantadon de Ŝoŝja, el ŝia nova E-KD "Nova tago venis", akompanita per projekciado de la vortoj, Enrica kantis du kantojn pri Hamlet kaj Zamenhof, kaj Tali prezentis du eŭritmiajn dancojn laŭ "Ho mia kor" kaj soneton pri Zamenhof de Nekrasov.

Okazis du prelegoj - Jehoŝua pri la unua israela poŝtmarko pri Zamenhof kaj Esperanto, aperinta antaŭ 10 jaroj, kaj Amri pri la temo "Ĉu Zamenhof kaj Esperanto endanĝerigas la Teron" - temis pri la asteroidoj kun tiuj nomoj. En la movada parto Amri faris la tradician raporton pri la agadoj de ELI dum la jaro, el kiuj li plej elstarigis la transiron al nova klubejo, la 17-an Israelan Kongreson en Jafo kaj la eldonon de la memorlibro pri Josi Ŝemer (la dua eldono estis ĵus presita kaj disdonita al la membroj kiuj ankoraŭ ne ricevis la unuan eldonon).



Tali dancas en la Zamenhofa Festo en Tel-Avivo

Sekve okazis vigla debato pri la elspezoj, kaj la kasisto Ŝlomo respondis kaj klarigis. Aliaj membroj petis esti pli informitaj pri la estrarkunsidoj (kiuj delonge estas malfermitaj al ĉiuj membroj). En la balotoj por la estraro estis elektitaj la ok antaŭaj estraranoj kaj aldone nova, naŭa estrarano - Asaf Ĥefec. Fine ni kantis la Himnon, bedaŭrinde sen piana akompano, sed kompencis la interna vervo kaj entuziasmo.

Astrobiologio - nova scienco pri la perspektivo de vivo ekstertera

A.Wandel

Aperis en la revuo Kontakto, n-roj 5/6 2015

En la lasta duonjaro okazis pluraj malkovroj kaj eventoj, kiuj aktualigas tiun ĉi artikolon eĉ pli. Jen koncize:

24 de aŭgusto 2016 - estis anoncita la malkovro de Ter-simila planedo en la vivo-zono ĉirkaŭ nia plej apuda stela najbaro, Proksima Kentaŭro [latine: Proxima Centauri]. Vidu la artikolon de A.Wandel en la israela scienca portalo "Hayadan", <http://www.hayadan.org.il/are-there-life-on-proxima-centauri-b-2608161>.

22 de februaro 2017 - estis anoncita la malkovro de planeda sistemo ĉirkaŭ la eta ruĝa stelo Trappist-1, 40 lumjarojn for de ni, kun sep planedoj similaj al la Tero, tri el ili en la vivo-zono.

11 de marto 2017 - unu el la plej grandaj televido-kanaloj en Rusio dissendis dokumentan filmon pri ekstertera vivo, kiu intervjuas A.Wandel kaj detale mencias liajn esplorojn. Laŭ oficialaj taksoj ĉirkaŭ 5 milionoj spektis ĝin. La ruslingva filmo estas videbla en Youtube, <https://youtu.be/rCkBZr6yg14?t=4472>



Kontakto n-roj 5/6 2015

La demando ĉu ekzistas vivo — aŭ eble civilizacioj — ie en la spaco, estas malnova, sed en la moderna epoko la scienco iom post iom havigas al ĝi respondojn malpli fantaziajn kaj pli bazitajn sur sciencaj esploroj kaj faktoj. En la lastaj monatoj aperis novaj esploroj en tiuj du terenoj, kiuj

povas plibonigi la ŝancojn trovi vivon eksterteran. En nia sunsistemo estis trovitaj signoj de likva akvo sur la planedo Marso. Tion raportis NASA (Usona Nacia Aeronauta kaj Spaca Administrado) en gazetara konferenco fine de septembro. En aliaj sunsistemoj, kiel asertas mia nova esploro, verŝajne troviĝas planedoj kun vivo (almenaŭ primitiva) eĉ en relative proksimaj steloj, je distanco de nur dekoj da lumjaroj. La ekscita konkludo estas, ke troviĝas probable milionoj ĝis miliardoj da planedoj kun simpla vivo en la Lakta Vojo.


1. Akvo sur Marso

En nia sunsistemo, unu el la malmultaj lokoj, kie sciencistoj provas malkovri vivon, estas la planedo Marso. Robotaj misioj serĉadis signojn de likva akvo sur la Ruĝa Planedo. Jam delonge oni scias, ke frostinta akvo troviĝas sur Marso — en la glaciaj ĉapoj kaj en la tero — sed ĝis tiu ĉi jaro likva akvo ne estis trovita. La observoj kaj esploroj montris, ke verŝajne Marso ja havis likvan akvon antaŭ miliardoj da jaroj, sed ĝi delonge malaperis el la grundo: ĝi frostis aŭ vaporigis kaj perdiĝis en la spaco. La nova eltrovo estas fakte krutaj ravinoj kun sekaj restaĵoj de saloj, kiuj aperas dum la marsa somero. La sciencistoj kredas, ke temas pri tre sala akvo, kiu pro la mineraloj solvitaj en ĝi povas resti likva ĝis temperaturoj de 20 gradoj celsiaj sub nulo, kiuj okazas en la varma sezono (la averaĝa temperaturo sur Marso estas ĉ. -50 gradoj). Tiu ekstreme sala akvo ne estas ideala por la Tera vivo, sed eble ekstremofilaj mikroboj povas vivi en tia medio. La serĉado de vivo sur Marso kaj la nova eltrovo de akvo estas traktitaj detale en artikolo, kiun mi verkis por Galileo, la plej grava popular-scienciga revuo de Israelo[1].

2. Kiel malaperis la marsa atmosfero?

Komence de novembro, NASA publikigis, ke la datumoj de la misio Maven (kiu atingis Marson en 2013) sugestas, kiel la marsa klimato transiris de varma kaj malseka surfaco — eble taŭga por vivo en la frua epoko — al la nuna malvarma, seka planedo, kiel Marso estas hodiaŭ. Maven trovis, ke gaso daŭre eskapas de la marsa atmosfero en la spacon pro la efiko de la suna vento, fluo de ŝargitaj partikloj, plejparte protonoj kaj elektronoj elsendataj de la suna atmosfero je

rapideco de miliono da km/h, kiuj daŭre disvastiĝas de la Suno en la spacon. La mezuroj de Maven montris, ke la ordinara suna vento elprenas el la atmosfero po ĉirkaŭ 100 gramojn en sekundo. Tiu erozio de la atmosfero de Marso signife pliiĝas dum sunaj ŝtormoj, kiel tiu okazinta en marto 2015, kaj verŝajne ankaŭ kiam la Suno estis juna kaj pli aktiva. La pli alta vaporiĝo-ritmo dum sunaj ŝtormoj, dum miliardoj da jaroj, iom post iom detruis la marsan atmosferon kaj kaŭzis la ekstreman klimato-ŝanĝiĝon de Marso, el milde varma malseka planedo en rustiĝantan frostintan dezerton. La sorto de Marso povas trafi ankaŭ aliajn planedojn, sed la Tero ŝajne estas pli imuna pro sia magneta kampo, kiu defleksas la ŝargitajn partiklojn en la suna vento, kaj pro sia pli forta gravito, kiu pli firme retenas la superajn tavolojn de la atmosfero.



La spacteleskopo Kepler

3. Ekster-planedoj kaj vivo ekster-tera

Antaŭ dudek jaroj astronomoj unuafoje malkovris planedon ĉirkaŭantan alian sunon ol la nian. Sekve, iom post iom estis trovitaj centoj da tiaj ekster-planedoj (planedoj, kiuj ĉirkaŭas sunojn for de nia sunsistemo, angle: exoplanets), sed ĉefe grandaj, gaso-planedoj similaj al Jupitero, kie la kondiĉoj ne estas favoraj por vivo, kiel ni


konas ĝin. Ili ankaŭ estis relative proksimaj al siaj sunoj, kaj sekve multe tro varmaj por vivo. En la jaro 2010 komencis funkcii la spacteleskopo Kepler, kiu dum kvar jaroj malkovris milojn da eksterplanedoj, el ili ankaŭ multajn similajn al la Tero, kiuj troviĝas en la ĝusta distanco de sia suno, por ke ili estu ne tro varmaj por vivo. Tiu atingo gvidis al grava konkludo: sunsistemoj kun planedoj, kaj aparte planedoj similaj al Tero, abundas en la kosmo. Tio proksimigas nin al la respondo por la antikva demando: “Ĉu ni estas solaj?”. Mi tiun temon pritraktas jam de pluraj jaroj, kaj plurfoje verkis kaj prelegis pri ĝi ankaŭ en Esperanto, ekzemple en IKU 2011[2]. Laŭ mia lastatempe publikigita esploro, la demando ne plu estas “ĉu ekzistas vivo ekstertera?”, sed “kiom abunda ĝi estas”.

4. La plej proksimaj vivantaj mondoj

La nova esploro pri la ofteco de planedoj kun potencialo por vivo aperis lastatempe en la internacia scienca revuo pri astrobiologio [3]. La esploro, kies preciza titolo estas “Pri la abundo de vivo ekstertera sekve de la trovaĵoj de la Kepler-misio” estis publikigita jam komence de decembro 2014 en la scienca ret-arkivo [4] kaj en la scienca revuo Galileo[5]. En la 8-a sesio de la Internacia Vintra Universitato okazinta dum la jarfino kadre de la Internacia Festivalo en Julich, Germanio, mi prelegis pri la planedoj malkovritaj de la spacteleskopo Kepler, kaj prezentis popular-sciencan version de mia esploro. La esploro estis prezentita en internaciaj sciencaj konferencoj en Nov-Zelando kaj en Havajo, kaj en la granda Internacia Kongreso pri Astronaŭtiko[6]. Recenzoj kaj reagoj aperis en pluraj internaciaj popularsciencaj novaĵ-portaloj. Skribas la populara scienca portalo Motherboard[7]: “Se troviĝas inteligenta vivo en la kosmo, ĝi probable ne estas proksima al ni, kaj ni ne povos atingi ĝin baldaŭ. Almenaŭ tio estas la konkludo de la astrobiologo [Amri Wandel] kiu, por la unua fojo en jardekoj, faris gravan ĝisdatigon al la ŝlosila formulo, la Drake-ekvacio, kiun sciencistoj uzas por serĉi vivon en la kosmo. [...] Uzante la novajn Kepler-datumojn, la astrobiologo Amri Wandel faris kalkulojn por taksu la abundecon de vivo-portantaj planedoj en nia angulo de la universo. La ekscita konkludo estas, ke troviĝas probable milionoj ĝis miliardoj da planedoj kun simpla vivo en la Lakta Vojo”. Pliaj recenzoj

pri la esploro aperis en la portaloj Engadget, ArXivnia Blog kaj Hayadan[8-10].

La Drake-ekvacio menciita en la recenzo estis proponita en 1961 de la usona astronomo Frank Drake, pioniro en la serĉado de inteligentaj radio-elsendoj de la kosmo por taksi la nombron de eksterteraj civilizacioj. Sciencistoj ofte kritikis la Drake-ekvacion pro tio, ke preskaŭ ĉiuj elementoj (parametroj) de la ekvacio ne estis konataj. En la nova esploro mi montras, ke la datumoj trovitaj per la Kepler-teleskopo ebligas pli fidindan takson de pluraj el tiuj parametroj, kiuj antaŭe ne estis konataj. La esploro estas rigora matematika analizo, kaj ne spekulacio pri la parametroj de la Drake-ekvacio, kiel estis pluraj antaŭaj diskutoj kaj tezoj pri tiu ĉi temo.



Diagramo de la probabla distanco al la plej proksimaj biologiaj najbaraj eksterplanedoj, depende de la valoro de la biologia parametro F_b , la probableco por evoluo de biologia vivo sur planedo kun taŭgaj kondiĉoj (laŭ la artikolo de Wandel [3,4]).

5. Niaj najbaroj: ĉu bakterioj kaj algoj aŭ evoluiĝintaj civilizacioj?

La esploro apartigas la demandojn pri la ŝanco trovi planedojn kun simpla, primitiva vivo kiel bakterioj kaj algoj, disde la trovado de

evoluiĝinta, kompleksa vivo, eventuale eĉ inteligenta vivo kaj teknologia civilizacio. La kialo de tiu divido estas simpla: surtere ekzistas vivo de jam 3,5 miliardoj da jaroj, sed dum 80% de tiu tempo temis pri ege primitivaj mikroskopaj estaĵoj, kiuj vivis en la oceanoj. Nur antaŭ ĉ. 600 milionoj da jaroj aperis kompleksa vivo, kaj nur antaŭ kelkaj jarcentoj aperis teknologia civilizacio. Sekve, la sciencistoj taksas, ke la plej abunda speco de vivo en la kosmo estas primitiva vivo, kaj inteligentaj civilizacioj estas multe pli maloftaj. Kvankam tiu nova esploro ne prezentas precizajn nombrojn, ĝi atingas surprizajn konkludojn: planedoj kun simplaj vivo-formoj kiel bakterioj ege abundas, kaj troviĝas verŝajne relative proksime al ni — en distanco de 10-100 lumjaroj, kio implicas, ke en nia galaksio troviĝas milionoj ĝis miliardoj da tiaj planedoj. En la proksima estonteco ni espereble povos konfirmi, ĉu troviĝas vivo sur tiuj planedoj, per spektra analizo de iliaj atmosferoj, helpe de la novaj teleskopo-projektoj TESS (serĉado de eksterplanedoj, planita ekfunkcii en la jaro 2017), JWST (6-metra spacteleskopo, 2018), TMT (30-metra teleskopo en Havajo, 2022) kaj pli. Se oni sukcesos tion fari por sufiĉe granda nombro da kandidatoj, eblos taksi la valoron de la plej interesa parametro en la ekvacio, F_b , la probablecon por evoluo de biologia vivo sur la planedo, kiu havas la taŭgajn kondiĉojn (nome konsisto kaj klimato sufiĉe similaj al tiuj de la Tero). Intertempe, mia esploro ebligas taksi la distancon al la plej proksimaj biologiaj najbaraj ekster-planedoj, por ajna valoro de la (ankoraŭ nekonata) biologia parametro F_b , kiel montras la diagramo.

6. Inteligenta vivo kaj teknologiaj civilizacioj

Jam de 55 jaroj astronomoj provas malkovri radio-elsendojn de eksterteraj inteligentaj civilizacioj kadre de la projekto SETI (mallongigo de la angla por “Serĉado de Ekster-Tera Inteligenteco”). Oni provas malkovri la radio-elsendojn de aliaj civilizacioj, kiuj uzas radion por komunikado same kiel ni, aŭ eĉ intence elsendas tiajn signalojn en la spacon por komuniki kun aliaj inteligentaj specioj. Por tio oni uzas grandajn radioteleskopojn, sed ĝis nun neniu inteligenta elsendo estis trovita inter la multaj signaloj de natura fonto. La elsendoj de civilizacioj estas verŝajne multe pli malfortaj ol tiuj de

naturaj fontoj, kaj tial tre malfacile troveblaj. Pro tio tre gravas la distanco al tiuj eventualaj civilizacioj, ĉar la kapablo malkovri ilin dependas de la forto de la signalo, kiu malfortiĝas kiel la kvadrato de la distanco. Tiuj teknologiaj komuniko-kapablaj civilizacioj, se ili ekzistas, estas verŝajne multe malpli abundaj ol primitivaj biologiaj planedoj. Laŭ la ekvacio de Drake, la nombro de tiaj civilizacioj dependas de tri nekonataj faktoroj: aldone al la supre priskribita biologia parametro F_b , kiu eble estos taksebla en la proksima estonteco, estas ankoraŭ du parametroj, kiuj estas kaj verŝajne restos tute nekonataj: la probableco de inteligenteco kaj komunikado — nome la ŝanco, ke sur biologia planedo evoluiĝos inteligenta specio, kaj ke ĝi havos la kapablon de interstela komunikado (ni nomu tiun parametron F_{ik}) — kaj la tipa daŭro de inteligenta komunika civilizacio, L_k . En la dua parto de mia scienca artikolo aperas diagramo simila al la ĉi-supra, kiu montras la distancon al la plej proksimaj komunikaj civilizacioj, depende de la supozitaj valoroj de la Drake-parametroj F_{ik} kaj L_k . Laŭ tiu mia esploro, eĉ por la plej favoraj aŭ optimismaj valoroj de la Drake-parametroj ($F_b=1$ kaj $F_{ik}=1$), la plej proksimaj civilizacioj, se ili ekzistas, verŝajne troviĝas je distanco de miloj da lumjaroj (aŭ pli), probable tro malproksime, por ke ni povu malkovri la radio-signalojn, kiujn tiuj civilizacioj eventuale elsendas.



Gigantaj antenoj de la projekto SETI en Nov-Meksiko, Usono

Referencoj

- [1] “Marso - dezerto aŭ fluanta akvo?”, A.Wandel, Galileo, novembro 2015
- [2] Internacia Kongresa Universitato 2011, <http://www.eventoj.hu/steb/miksitaj/iku2011.pdf>
- [3] Wandel, A. 2015, International Journal of Astrobiology, 14, pp. 511-516.
- [4] ArXiv, <http://arxiv.org/ftp/arxiv/papers/1412/1412.1302.pdf>
- [5] “Vivo sur foraj planedoj”, A.Wandel, Galileo, junio 2015.
- [6] 66th International Astronautical Congress, Jerusalem, oktobro 2015, <http://www.iac2015.org/congress/about/>.
- [7] Motherboard, <http://motherboard.vice.com/read/alien-life-is-abundant>
- [8] Engadget <http://www.engadget.com/2014/12/06/wandel-kepler-research/>.
- [9] ArXiv blog <https://medium.com/the-physics-arxivblog/how-data-from-the-kepler-space-telescope-is-changing-the-drake-equation-cea9c7008bc1>
- [10] Hayadan <http://www.hayadan.org.il/kepler-findings-1712141>.

Israela Esperanta Kongreso: Esperanta juvelo en la Orienta Mediteraneo.

Carlos Spinola, Hispanio

De la 14-a ĝis la 16-a de aprilo de 2016 okazis la 17-a Israela Kongreso de Esperanto (IKE-2016) en la urbo Tel-Avivo-Jafo.

Partoprenis ĝin kvindeko da homoj el Israelo kaj el aliaj eŭropaj landoj (Nederlando, Svislando, Italio, Belgio,



Hispanio). La kongresejo estis ĉe la komforta hotelo Ruth Daniel, tute apuda al la historia urbo Jafo kaj ĝia plurmiljaraĝa haveno.

Alvenante al Israelo, kiam oni trairas la flughavenon kaj vojaĝas tra la stratoj kaj aŭtoŝoseoj, aŭ per la oftaj kaj komfortaj trajnoj, kaj promenas tra la urbaj stratoj, oni jam rimarkas kaj spertas evoluintan kaj funkciantan ŝtaton, kiu sukcesis spite ĉiujn malfacilaĵojn kaj okazintajn militojn, kaj ke ankoraŭ ĝi ne aĝas 70 jarojn.

Jam en la kongreso multe impresis nin la familia etoso inter la israelaj ĉeestantaj samideanoj, kaj ilia akceptema kaj afabla sinteno por ni, eksterlandanoj. Ili ĉiam zorgis kaj helpis por solvi ĉiujn bezonojn pri transportado kaj loĝado, fakte samideano Eran Vodevoz akceptis nin en la

flughaveno por alporti nin en la hotelon, ankaŭ multe helpis aliaj samideanoj, nome Jehoŝua Tilleman, Nava Bilitski, Dror Gaon, Jinon Meiri, Jaela ..., sub la efika kunordigado de Amri Wandel, kiu zorgis pri ĉiuj detaloj. Kortuŝa estis la partopreno de kompletaj familioj, tiu de Eran kun lia edzino kaj gefiloj jaraĝaj de 2 ĝis 9, tiu de Dror Gaon, kun lia filino jam knabino, kaj tiu de Amri kun lia tuta esperantista membraro, Gila, Tali kaj Maja, krom lia filo Ran, kiu ja kore ĉeestis.



Carlos kun Renato Corsetti dum kongresa ekskurso
Mi parolis kun kelkaj homoj, kaj ĉiuj havis interesajn, nekutimajn kaj diversajn historiojn. Tiel mi renkontiĝis kun homoj, devenantaj ili mem aŭ iliaj gepatroj el Germanio, Pollando, Litovio, Kanado, Urugvajo, Rusio, Usono... Aparte la infanoj, la plej juna ĉeestanto al la kongreso estis Yotam Svoray, studento pri matematiko en la universitato de Be'er Sheva, loĝanta en urbo ĉe la Negev dezerto. Li komencis lerni antaŭ nelonge, sed jam bone parolis kaj interkompreniĝis esperante, ĉiam kun sia gaja kaj simpatia sinteno.

Granda allogaĵo, por ke la eksterlandanoj partoprenu la israelan kongreson, estas ĝiaj antaŭa kaj postkongresa ekskursoj, bone planataj kaj

gvidataj de Amri Wandel, kiel profesia turisma gvidisto en la germana, hebrea kaj kompreneble Esperanto. Tamen, unue mi priskribos la kongreson mem, kaj poste la antaŭan kaj postan ekskursojn.

Ĵaŭde posttagmeze la kongreso malfermiĝis kaj komenciĝis per interesa laborgrupo pri konsciiĝo gvidita de Gila Wandel, kaj prelego de Georgo Soussois pri Belgio kaj Esperanto. Sekvis prelegeto de Karlo Spinola, ankoraŭ freŝbakita esperantisto, pri lia propra lerna sperto kaj pri la ekesto kaj disvolviĝo de Esperanto en Hispanio, Andaluzio kaj Malago. Rimarkinde estas, ke unu el la fruaj gramatikaj libroj, kiujn Zamenhof sendis al Hispanio en la jaro 1889, alvenis al Malago al instruisto José Rodríguez Huertas, kiu okazigis jam en 1890 la unuan kurson de Esperanto en Andaluzio, kaj fondis la unuan Esperantan Societon de Hispanio en la jaro 1892.

Enrica kaj Doron



La lastan ĵaŭdan prelegon magistre kaj klare prezentis Amri Wandel pri tri ĵusaj kaj tre interesaj astronomiaj malkovroj, nome Gravitaj Ondo, Akvo en Marso, kaj la Naŭa Planedo. La unua temo, kiu rilatas al malfacila scienca konsekvenco de la ĝenerala teorio de relativeco de Einstein, estis klare kaj kompreneble prezentata. Ankaŭ tiel estis la aliaj helpe de belaj kaj klarigaj bildoj.

Post promenado al sufiĉe proksima restoracio, kie ni gustumis israelajn pladojn kaj babilis en agrabla interkona vespera etoso, okazis en la kongresejo la Israela Vespero. Tie Enrica kun Doron al la piano prezentis belajn kantojn de Jona Volaĥ, ankaŭ Ŝoŝia prezentis novajn kantojn tradukitajn de Amir. Iliaj tekstoj estis projekciitaj surekrane kaj eĉ deklamitaj antaŭ la kanto

Amri ĉiĉeronas dum kongresa ekskurso



tiel, ke oni povis legi kaj ĝui ilian poezian belecon.

Vendrede la unua kongresa agado estis promenado tra la historia kvartalo Neve Cedek, kie en la jaro 1887 grupeto da judaj familioj komencis konstrui la unuajn hejmajn domojn ekster la tro-popolamasa Jafo. Post kelkaj jaroj, en 1909, tiu kvartalo fariĝis Tel-Avivo, kaj poste la moderna kultura kaj ekonomia urbo Tel-Avivo-Jafo. Tiu promena kaj surstrate interesa prelego gvidata de Amri pri la historio de la urbo, estis interplektita kun multaj amuzaj, artaj kaj historiaj rimarkoj kaj vizitoj. En Tel-Avivo okazis la 85-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2000.

La posttagmeza programo komenciĝis per tre interesa debato pri “paco”, prezentata kaj gvidata de Renato Corsetti, kiu enkondukis la malfacilan temon pri la paco en tiu regiono historie kaj nuntempe. Multaj ĉeestantoj



partoprenis la diskuton por esprimi siajn vidpunktojn kaj variajn konsiderojn pri eblaj vojoj al la solvo. Por mi, eksterlandano, estis tre interese aŭskulti tiujn spertojn kaj opiniojn de israelanoj, kiuj ĉi tie travivas kaj alfrontas kune kun siaj familianoj siajn

ĉiutagajn vivojn kaj esperojn. Tiel oni montris, ke tiu lando kaj ĉiuj ties homoj meritas vivi kaj evoluigi pace kaj justece. Kiel tie oni diris, eble tio povos okazi, kiam tiu regiono ĉesos esti la batalejo de grandaj eksterlandaj politikaj konfrontoj kaj interesoj, kaj tiel ties homoj havos la ŝancon pace evoluigi kaj plibonigi siajn personajn kaj familiajn vivmanieron kaj estontecon.

La debaton sekvis kant-ateliero kun la fama paro Kajto: Ankie kaj Nanne. Unue ni ĉiuj festis al Amri per la “Pra-Eksplodo”, kiu eksplodis pli forte ol neniam, kvankam “en la komenco estis vere nenio”... Ili mirinde vigligis, kaj kantigis nin, kaj eĉ starigis nin ĉiujn per siaj plej famaj kaj belaj kanonaj kantoj.

Vespere okazis la solena vespermanĝo en la kongreseja hotelo. Sur tablo antaŭ la restoracia enirejo kuŝis preparitaj lumetoj por festi la hebrean sabaton. Jam ene, la samideano Yehuda Miklaf solene recitante benis la manĝadon laŭ la tradicia juda kutimo, kiu estis tre kortuŝa. Dum la manĝo mi multe ĝuis interparoli kun li, tiom gaja kaj interesa homo, kundividante Kajto muzikas en la Kongreso



niajn proprajn travivaĵojn.

Post la vespermanĝo okazis en la kongreseja salono la granda koncerto de Kajto, en kiu ankaŭ ĉeestis la familio Vodevoz kun sia infanaro. Sed unue ni spektis la belegan kaj pacigan eŭritmian danceton de Tali sub kortuŝaj vortoj de zamenhofa poemo. Dum la koncerto multaj belaj kantoj kaj melodioj de Ankie kaj Nanne brakumis nin, kaj ni kune kantis kaj pensis, ke “La homo eble ne estas la sola

pensema estaĵo”, kaj sentis ke “Ĉiu palpebrumo gravas”, kaj flugis en la vento kun unu, du, tri, ... multaj kajtoj, kaj tiel ni revis pri kovrado de la ĉielo per pacarmiloj, niaj kajtoj.... Kongresanoj ĉe la Zodiaka Fontano en Jafo

Sabate matene Amri gvidis la promenadon kaj malkovron de la malnova Jafo, ĝiaj bazaroj, monumentoj, kaj ĝia plurjarmila historia haveno kun la Andromeda roko, kiun li revivigis per la rakonto de la greka mitologio. Ni ankaŭ vizitis la preĝejon de Sankta Petro, fotis ĉe la fonto de la Zodiako, supreniris al la monta parko, kiu havas historiajn restaĵojn kaj belvedero kun belega vidaĵo de Tel-Avivo-Jafo; ni ankaŭ promenis tra la stratetoj de la malnova historia urbo, kaj travivis la festan kaj pacan sabatan etoson en la haveno, stratoj kaj restoracioj de la urbo Jafo.



Post la tagmanĝo okazis la solena fermo de la kongreso. Unue kortuŝe estis rememorita la israela samideano Josi ŜEMER, "La koro de la Esperanto-Movado en Israelo, amata tra la tuta mondo", kiu forpasis antaŭ 3 jaroj, post longa kaj fruktodona esperanta agado, lasante rimarkindan kaj karan spuron en la israela kaj internacia movadoj. Poste okazis kelkaj administraj komentoj, inter ili la ŝerca sinprezento de



Jehoshua Tilleman kiel kasisto: malfacila tasko estas elpreni monon el judoj. Finfine partoprenis eksterlandanoj, kiuj salutis la IKE-2016 nome de la respektivaj landaj asocioj aŭ kluboj. Tiel Carlos, nome de la Hispana Esperanto Federacio (HEF) kaj la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU) donacis al ELI (Esperanta Ligo de Israelo) kaj Amri Wandel la esperantigitan ĉefverkon de Miguel de Cervantes "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha", kaj aliajn verkojn de la hispana literaturo. Li ankaŭ alportis la jubilean verkon ilustritan per bildoj pentritaj de infanoj el la tuta Eŭropo "Don Quijote parolas Esperanton" de J. A. del Barrio,



krome la esperantan poemaron de Angel Arquillos “Mediteraneaj eroj”. Siavice Amri donacis la esperantan tradukon de la rakonto Esperanto de la verko de Amos Oz “Inter amikoj” kaj “Perdiĝi en Finsulo” de Moti Sarid. Tiel gaje kaj frate finiĝis tiu mirinda israela kongreso, kiu ja valoras la partoprenon de multaj kaj israelanoj kaj eksterlandanoj, tiuj lastaj aldone rekompencitaj kaj rekompencotaj per interesaj antaŭ- kaj postkongresa ekskursoj.

Mia Israela Kongreso

Nelly Krasniqi/ Svislando

Kiam mi promesis skribi artikolon pri nia belega vojaĝo en Israelo kaj Jordanio, mi ankoraŭ ne vere konsciis, kiom da traviaĵoj mi havos por rakonti. Do – kie mi komencu?

Je la komenco, kompreneble. En la flughaveno de Tel-Aviv, kie Eran jam atendis nin (Conĉi,

Carlos kaj min) kaj ĝentile ŝoforis nin al la hotelo Ruth Daniel. La venontan matenon ni trajnveturis al Haifo, kie Jehoŝua gvidis nin al la hotelo « Port Inn » - cetere unu de la plej agrablaj, ĉarmplenaj hoteloj kiujn mi konas.

Jehoŝua gvidis nin al Akko, kie ni fuĝis tra la sekreta tunelo el la kastelo. Poste li gvidis nin tra Haifo, montris al ni la Bahai-ĝardenojn (bedaŭrinde pro pluvo ni ne povis eniri). Sed estis belege vojaĝi per buso ĝis la plej alta punkto kaj ĝui la superrigardon. Haifa estas bela, interesa urbo. Tion ni ankaŭ konstatis vespere, kiam ni trio pe iris vespermanĝi en tre interesa



Familio Wandel en la monteta ĝardeno en Jafo, fone Tel-Avivo

restoracio en la germana kolonio. Ege bongusta manĝo! Haifa dumnokte estas iel magia.

La venontan tagon Amri ŝoforis nin al Nazareto, kie komenciĝis nia vogaĝo sur la spuroj de Jezuo. Mirinde, kiel oni povas sekvi la vojon de la tuta historio. Stranga sento vidi la lokojn priskribitajn en la Biblio. Tre plaĉis al mi la mozaikaĵoj de Maria el ĉiuj landoj, kiuj troviĝas en la preĝejo de la Anunĉiaco. Ekzistas eĉ Esperanta mozaikaĵo, mirinde! Amri vane klopodis konvinki la respondeculojn, ke la titolo devas esti ESPERANTO, ne ESPERANTOS. Eble iam oni ja tamen sukcesos. Tio estos preskaŭ miraklo kaj merito apartan mozaikaĵon. La preĝejo de la Anunĉiaco tre plaĉis al mi, ĝi estas lumplena, kun agrabla etoso.

Oni ne nepre devas esti religia por esti impresita de la belaj lokoj, floroj, koloroj kaj preĝejoj.

Kaj kun iom da fantazio oni ja povas imagi, kio okazis siatempe. Kompreneble, je ĉiu miraklo aŭ grava preĝo oni konstruis preĝejon kun belaj ĝardenoj, vere vidindaj lokoj. Laŭ



mi la pejzaĝo ĉirkaŭ Carlos, Conĉi, Nelly, Amri ĉe la Jordano, la baptejo "Jardenit" la lago de Galileo estas

tre mirinde bela. Ni vidis la antikvan boaton, kiun oni trovis en la lago, kaj la filmon pri ĝia malkovro. Kia ekscito estis la trovo de boato de antaŭ dumil jaroj, vere gravega historia trovaĵo!

Entute ni pasigis tre belan, gajan, interesan tagon, kaj la venontan matenon ni, tri turistoj, iris al Wadi Nisnas. Tiu merkato estas nepre vidinda, tre multkolora kaj plena da aromoj. Finfine alvenis Jehoŝua kun Jinon por ŝofori nin denove al Jafo por la kongreso. Jinon kiel ŝoforo kaj Jehoŝua kiel navigilo – dankon por la sperto de la israela urba trafiko.

Dum la kongreso la vetero pliboniĝis. En Haifa ni vere bezonis jakon kaj eĉ pluvombrelon. Sed nun dum la vizito de Jafo fariĝis bela suna vetero, kaj ni tre agrable promenis kaj rigardis la diversajn antikvajn kaj

modernajn vidindaĵojn. Nia grupo fariĝis sufiĉe granda kun agrabla etoso. Ne demandu, kion mi plej ŝatis – tion mi tute ne kapablas diri. Tiom da impresoj, artaĵoj, antikvaĵoj, homoj tre diversaj. El la monteto de Jafo ni vidis la pejzaĝon de la Tel-Aviva marbordo norden ĝis la urbo Herzlia. Sekve ni vizitis la antikvan havenon de Jafo, la ĉarmplenan antikvan urbon, kiun oni tiom bele restaŭris.

La kongreso estis plena da interesaj kontribuoj. Mi ja ne dirus, ke mi plene komprenis la prelegon de Amri pri la astronomiaj malkovroj (kvankam mi ĉiukaze atente aŭskultis), sed mi jes komprenis kaj tre ŝatis la dancon de Tali kaj la laborgrupon pri memkonsciiĝo gvidita de Gila. Kaj kompreneble la muzikajn kontribuojn de Enrica kaj Doron, kaj la belege tradukitajn tekstojn de Amir, kortuŝe kantitajn de Ŝoŝia.

La kulmino estis sendube la koncerto de Kajto. Kiel du homoj kapablas krei tiel gajan etoson en nur kelkaj sekundoj? Tio devas esti donaco de la universo aŭ io simila. Grandioza!

Post la kongreso Kajto kaj mi tranoktis en la nova urbo Modiin, ĉe Amri kaj Gila, Carlos, Conĉi kaj Georges en Jerusalemo. Estis agrabla vespero,



La Ora Kupolo. De maldekstre: Carlos, Nelly, Ankie, Nane, Nava, Conĉi, Georges, Amri

ni multe babilis kaj ridis, vespermanĝis en proksima restoracio. Frue en la sekva mateno ni ekveturis al Jerusalemo, kie ni renkontiĝis kun Nava kaj la aliaj. Nu, kion mi rakontu pri Jerusalemo. Magia loko, oni tuj estas iel kaptitaj. Ni vidis la Lamentan Muron kaj vizitis la Templan Monton – kie ni sukcesis kaŝe fotiĝi kun la E-flago malgraŭ la striktaj gardistoj kiuj malpermasas ĉiajn flagojn ktp...



Ĉe akvofalo en Ein Gedi. De dekstre: Nelly, Nava, Carlos, Conĉi, Ankie

Nia vojo gvidis nin al la Morta Maro, al Kumran kaj la oazo Ein Gedi. Tio estis tre bonvena ŝanĝo, ni volonte freŝiĝis en la akvo de Ein Gedi! Intertempe la temperaturoj supreniris, kaj iom da freŝeco estis pli ol agrabla. Restis ankoraŭ sufiĉe longa vojo ĝis nia venonta celo, Masada, kie ni tranoktis. Tie ni devis adiaŭi Nava, kiu hejmenveturis. Grandan dankon al vi, Nava, por ŝofori Carlos, Conĉi kaj Georges!

Georges kaj mi iris la la gastejo, kie ni atendis la aliajn, kiuj sinbanis en la Morta Maro. La plano estis kune vespermanĝi en la hotelo – sed bedaŭrinde intertempe la kuirejo fermiĝis por la paska purigado. Kion fari? Amri, Georges kaj mi veturis do al la apuda restoracio por aĉeti manĝaĵojn, dum la aliaj forduŝis la salon de la Morta Maro. Ĉio bone, oni estus povinta kredi – sed ni ja estis en la lando de la mirakloj: dum la preparado de la manĝaĵoj la prezoj mirinde ŝanĝiĝis de 59 al 95 NIS! Amri disputadis kun la ĉefo, dum ni pli kaj pli febliĝis pro malsato. Sed finfine oni atingis kompromison, kaj ni malfrue sed feliĉaj manĝis en la

ĝardeno de la gastejo. Ege bongusta manĝo – kaj ne nur ĉar ni estis kvazaŭ preskaŭ mortmalsataj! Kaj mi lernis la hebrean vorton ĥamiŝim ve tejŝa, kiu signifas 59. Mi neniam forgesos ĝin...

La venontan matenon Carlos, Conĉi kaj mi grimpis supren al Masada, dum la aliaj prenis la telferon. Jam en la stacio atendis nin surprizo: ibekso, kie tute trankvile promenis tie! Eble ĝi ne emis grimpri kaj intencis aĉeti bileton por la telfero? La grimpado per la Serpenta Pado vere indis: la elrigardo estas tre impona. Kaj kiam oni alvenas supren - oni simple nur miras. Kiel la homoj kapablis vivi tie, oni ne povas imagi. Kaj kiom da historio oni sukcesis sufiĉe kredeble rekonstrui. Amri tre bone klarigis la historion kaj gvidis nin al la restaĵoj de la palaco de Herodes. Eĉ la restaĵoj estas imponaj, ni ne parolu pri la origina majesta palaco! Finfine ni ekveturis al Eilat. Mi ankaŭ nepre menciui la survojan viziton de la rivereto Bokek, kie ni renkontiĝis kun Eran kaj lia filo Omer por plezure sperti la akvon kaj rokojn en tiu kaŝita oazo. En Eilat ni alvenis preskaŭ tro malfrue por la gasteja vespermanĝo, sed bonŝance restis ankoraŭ sufiĉe por ni ĉiuj. La venontan matenon ni ekis al la jordana landlimo. Tie atendis nin nova surprizo: oni postulis pagon de 60 dinaroj (85 eŭroj) por la vizo. Oni klarigis, ke temas pri nova regulo, sed se oni tranoktas almenaŭ dufoje en Jordanio, oni ricevas la monon dum la foriro. Kion fari? Amri ekhavis la ideon modifi nian planon, aldoni duan trankvilon en Jordanio, kaj revojaĝi al Eilat frumatene. Tiel oni perdis iom malpli da mono. Kaj tiel ni faris.

Kaj ankoraŭ alia mirindaĵo okazis : dum la atendado je la landlimo alparolis nin junulino el Latvio – neatendite kaj en bela Esperanto! Ŝi estis kun grupo, en kiu ŝi estis la nura esperantistino, kaj tute entuziasme alkuris por saluti nin. Kia ĝojo! Bedaŭrinde, ne restis sufiĉe da tempo, sed almenaŭ por interŝanĝi adresojn.



La grupo sur roka ponto en Wadi Rum

Finfine ni transiris la limon, kaj post longa veturado atingis Wadi Rum, kie nin atendis nia beduena gastiganto Salem, kun ĵipo. Li ŝoforis nin tra la vidindaĵoj de Wadi Rum, de unu loko al la alia, lasis nin en roka kanjono, kie ni grimpetis kaj marŝadis ĝis la interkonsentita loko. Tie atendis nin nova bela surprizo: Salem, kun bongusta teo, kiun ni tre volonte trinkis! Ni ja estis tiom plenaj da impresigaj, nekredablaj bildoj. Vortoj simple ne sufiĉas por priskribi tion. Rokoj, rokegoj en nekredablaj formoj kaj koloroj, vastego, kiu dum jarcentoj antaŭ ni jam estis tie, kaj post ni ankoraŭ estos. Mi sentis min tre malgranda kaj sen-signifa. Kaj ankoraŭ atendis nin Petra!

Per la ĵipo kun bele flirtanta Esperanto-flago ni vojaĝis al la beduena tendaro, kie ni tranoktis. Mi tute ne atendis ion tian – vere luksaj tendoj kun tre komfortaj litoj –



Nelly en Wadi Rum


eĉ duŝejoj kaj necesejoj troviĝis en la tendaro! Kaj la beduena kuirado estis ne nur mirinda sed bongusta. Kiel saĝe ili preparas manĝaĵojn en kaserolo per karbonfajro en la tero. Oni nur devas atendi – elfosi kaj jen ĉio. Post la manĝo ni sidiĝis je la fajro, trinkis teon, babilis, revis, silentis.... la plena luno iom ĝenis la stelobservadon, sed ne gravas. La etoso estis tiel malstreĉa, la tempo tute ne gravis. Kaj kiom kontenta mi estis pri la ŝultrotuko, kiun oni altrude vendis al mi en Jerusalemo! La noktoj en la dezerto estas malvarmaj, same kiel la tagoj estas varmegaj. Tion mi ne pripensis - bona sperto.

La venontan matenon ni ricevis bongustan matenmanĝon – kaj ek en la ĵipo al la parkejo ĉe la enirejo. Tie ni devis adiaŭi nian ĉarman ŝoforon, kaj daŭrigis nian vojaĝon kun alia ŝoforo - Fajez. Evidentiĝis, ke li flue parolas la hebrean, kaj li kaj Amri havis tre viglan konversacion. Ni trovis belan hotelon en Petra, kie ni povis lasi niajn aferojn por tuj eki al la magia ŝtona urbo. Kaj tie denove atendis nin surprizo: oni volis altrudi al ni lokan angle parolantan ĉiĉeronon, ĉar ni estis grupo de pli ol kvin.

Komence oni ne akceptis nian provon ŝajniĝi du grupetoj, kaj insistis, ke ni pagu por la ne dezirita ĉiĉerono. Sed ŝajne ne ekzistas problemoj, kiun Amri ne kapablas solvi. Finfine la ĉefo konvinkiĝis, ke ni estas du grupetoj, kaj oni permesis nin daŭrigi. Por ne riski denove esti persekutataj, ni ne marŝis tro proksime. Ni sentis nin iel observataj dum nia vagado en la vojo al Petra. Mi ne scias, ĉu vere oni observis nin, aŭ ĉu tion ni nur imagis.

Kiel mi klarigu Petra – unufoje mi ne havas vortojn. Same kiel en Wadi Rum mi sentis min kiel ero en la universo. La vojo fariĝis pli kaj pli kanjono, la ŝtonoj pli kaj pli ruĝaj kaj eĉ multkoloraj. Estis tiom por rigardi kaj miri, tiom da supren- kaj malsupreniroj, kaj en ĉiu angulo malkovriĝis iu nova mirindaĵo. Fine ni alvenis al la kulmino: la granda ruĝa templo, kiun tiom ofte oni vidas sur fotoj. Sed fotoj simple ne kapablas doni tiun senton. Stari en la mezo de tiu magia loko, tiu lumo... mi ja ne ofte restas sen vortoj – sed kelkfoje mi povas nur silente miri. Kaj ankoraŭ ne finiĝis nia promeno: ankoraŭ ni supren-grimpis monteton kun aliaj belaj antikvaĵoj. Estis multe pli ol mi atendis, multe pli.

Finfine la sunsubiro alproksimiĝis, kiam Amri havis la ideon, ke oni povus ankoraŭ fari ekstra-migradon anstataŭ rekte reiri al la enirejo. Ne ĉiuj emis kuniri, nur Carlos kaj Ankie. Do ĉi-foje ni vere fariĝis du grupoj! Conĉi, Nanne, Georges kaj mi komencis nian malsupreniron, Amri kun Carlos kaj Ankie ekiris al la alia direkto. Ni kvar trankvile promenatis, observante la preparojn por la nokta lumspektaklo. Ni ja ne devis rapidi, la aliaj certe post ni alvenos. Jes, sed kiom post ni, tion ni ne estus kredintaj.



Georges, Nanne, Ankie kaj Amri en Petra

Ni longe atendadis, kaj finfine eĉ zorgis. Telefona kontakto ne eblis, kaj ni ja eĉ ne sciis kie serĉi! Finfine Nanne kaj Georges reiris al la hotelo, Conĉi kaj mi restis en la turisma centro ĉe la enirejo. Finfine ni ankaŭ decidis iri al la hotelo, sed tie neniu sciis, kie estas niaj geamikoj. Ni vere timis. Estis jam certe la deka horo! Finfine la telefono en la hotelo sonis, kaj oni diris



Ce El Der, la "Monasterio" en Petra

al ni, ke niaj geamikoj alvenos post mallonga tempo. Uff. Kia malpezigo! Ŝajnas, ke niaj herooj havis nekredablajn aventurojn kun multekostaj azenoj kaj iliaj friponaj posedantoj, sed tion ili mem rakontu. Ni estis feliĉaj kaj kontentaj, ke nenio okazis! La venontan tagon ni denove transiris la landlimon, kaj kompreneble ni postulis nian monon ĉe la oficisto, kiu prenis ĝin antaŭ du tagoj, kaj promesis redoni, se ni tranoktus dufoje en Jordanio. Certe oni redonis la monon, sed ni tamen devis pagi 10 dinarojn, kio ne estus bezonata, se oni tranoktus trifoje en Jordanio. Kompreneble oni volis trompi nin, kaj unue redonis nur la duonon de la mono – sed finfine ĉio

bone iris, kaj ni revenis al Israelo. Tie atendis nin ankoraŭ neatendita kulmino: ŝnorkli en la Ruĝa Maro! Mi neniam estus kredinta, ke mi iam farus tion, sed oni ja neniam diru « neniam ». Kia sperto! Kiel belega fino de tiu grandega vojaĝo! Estis kiel la kovrilo sur plenplena barelo.

Post tio atendis nin la longa revojaĝo al Tel Aviv. Denove tra la majestaj pejzaĝoj de la suda Israelo, ĝis kiam ni atingis la unuan urbolumojn, kaj jen – nediskuteble la fino de niaj belaj ferioj atendis nin.



Kun Salem, nia beduena gvidanto en Wadi Rum

Amri ŝoforis nin ĝis la trajnstacio de Modi'in, kie ni vole nevole devis adiaŭi. Sed atendis nin ankoraŭ malgranda aventuro: la biletejo estis ĝuste fermanta, kiam ni alvenis – sed feliĉe la ĝentila biletvendistino – anstataŭ iri hejmen – helpis nin aĉeti la biletojn je la aŭtomato. Grandan dankon al vi, eĉ se vi neniam legos tion.

Kaj ni ne longe devis atendi trajnon. Mi ne bone memoras, pri kio ni tiom ridegis en la trajno. Estis io pri nia lasta vespermanĝo, kiu konsistis el kuirita ovo kaj lasta peco de beduena pano, kiun ni importis el Jordanio. Pere de mia svisa armetranĉilo ni tre juste partigis tiun luksan manĝon. Carlos iel sukcesis verŝi akvon sur ĝin – sed tamen restis manĝebla... En la trajnstacio Hagana Carlos, Conĉi kaj mi eliris de la trajno, Georges devis veturi iom pli. Ni trovis taksion – kaj kompreneble la taksisto trompis nin. Ni estis tro lacaj por rimarki, ke li ne enŝaltis la mezurilon, kaj finfine ni estis tro lacaj por disputi. Nu jes. Alia sperto.

Finfine ni estis tiel kontentaj esti en la hotelo kaj trovi liton kaj dormi.

Nian lastan matenmanĝon ni havis en la antaŭa kongresejo – ĉar la manĝejo estis jam preparita por la paska ceremonio. Sed ne gravis – tute kontraŭe, ni trankvile kaj iom melankolie manĝis – kaj ek al la flughaveno.

Ekde mia reveno al Svislando pasis pli on unu semajno – kaj ankoraŭ mi sonĝas pri la du semajnoj en Israelo kaj Jordanio. Longe daŭros por digesti tiujn spertojn.

Dankon, dankegon al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiuj du nedireble belaj semajnoj. Mi vere ne havas sufiĉe da vortoj. Nur DANKON. DANKEGON. Mi amas vin ĉiujn.

Mia vojaĝo al Israelo 2016

Georges Sousois, Belgio

1. Mia decido iri al Jafo

Dum la UK en Lille, Amri altiris min al tiu vojaĝo al Israelo. Ĉar mi jam vidis parton de la nordo de Israelo kaj Palestino tri jarojn antaŭe (la edzo de mia gvidistino estis palestinano loĝanta en Bruselo), mi decidis iri viziti la sudon de tiu interesa lando, kaj Petra.

Pro la eventoj en Bruselo mi tre malfacile ricevis sidlokon en la aviadilo al Ben Gurion flughaveno. Fine, mi povis nokte vojaĝi el Bruselo por ĝustatempe atingi la kongresejon. La tagon antaŭe mi aŭdis, ke mi povos preni la aviadilon en Zaventem (Bruselo) anstataŭ Antverpeno aŭ Lieĝo, du flughavenoj, el kiuj oni povis provizore flugi anstataŭ Bruselo, kies flughaveno devis esti riparita. Estis iom da konfuzo post la atencoj: bomboj eksplodis en metroo de Bruselo kaj en la flughaveno.

Por atingi Zaventem estis trajnoj ĝis la vilaĝo de Zaventem kaj poste buso por la flughaveno. Mi konatiĝis kun sinjoro, kies filo estas deputito de la brusela parlamento, kaj estis atendanta novaĵojn, ĉar pro la ĵusa demisio de ministrino li mem pensis fariĝi ministro. Sed tio ne sukcesis, kiel ni aŭdis du horojn poste...

Do, mi pasigis kvin horojn antaŭ ol povi flugi. Tre longa vico antaŭ la eniro tra tendoj, kie oni kontrolis. Mi dufoje faris tion, ĉar ne estis permesate fumi en tiuj tendoj...

Fine ni atingis Ben Gurion en la mezo de la nokto. Sed la publikaj transportoj je tiu tempo ankoraŭ ne funkciis.

Intertempe mi fotis la belajn lumaĵojn ĉirkaŭ la eniro de la flughaveno. Ne daŭris multe da tempo, antaŭ ol iu el la sekureco de la flughaveno demandis min, kion mi estas faranta. Li ne ŝajnis kredi min, kiam mi diris, ke mi trovas tion bela

Atendante la trajnon mi renkontis grupon de gejunuloj, kiuj estis ĵus revenintaj el Varsovio. Ili iris al Pollando por ekaperigi tie ĉion, kio estis alportita kaj kreita de judoj tie. Mi kaptis la okazon por paroli al ili pri d-ro Zamenhof, tiu genia judo, kiu inventis kaj lanĉis nian internacian lingvon. En Eŭropo oni en la komenco silentis pri la juda deveno de Zamenhof, ĉar

malgraŭ ĉio estas ankoraŭ homoj, kiuj sin fermas, kiam ili aŭdas la nomon « judo »! Mi disdonis kalendarojn en E-o kun klarigoj pri la lingvo en la franca. Oni semas... !

Poste mi estis helpata de juna ukraina virino, kiu laboras en Israelo. Dank' al ŝi mi povis trovi taŭgan taksion por Jafo, kaj je la kvara kaj duono matene mi estis en tiu urbo. Ĉio estis ankoraŭ nokta kaj senbrua. Estis malpli da lumo ol en Belgio. La ŝoforo helpis al mi trovi mian hotelon, ĉar ĉio estis fermita. Kaj estis neniu ĉirkaŭe. En la akceptejo mi trovis oficiston. Li ne povis doni al mi ĉambron, kaj mi do dormetis sur sofo. Je la sesa kaj duono mi vekigis, kaj oni donis al mi ŝlosilon de mia ĉambro. Mi ripozis ĝis la dekdia.

2. La Israela Kongreso

Poste mi iris promeni en Jafo, sed ne trovis ion interesan. Reveninte mi trovis samideaninon, kaj komencis babili kun ŝi. Iom post iom venis gekongresanoj. Malfermiĝis la kongreso, kaj mi renkontis malnovajn geamikojn, kaj konatiĝis kun novaj. Du aŭ tri ŝatis paroli la francan kun mi, kaj estis agrablaj konversacioj. Iu sinjorino venis el Francio al Israelo post la Mondmilito. Perdis siajn gepatrojn pro la konsekvencoj de kontraŭjuda politiko en la tiama Francio, lando kiu sendis siajn samnacionojn al la morto. Sed neniu nacio estas senpeka; neniu subnacio ankaŭ. Neniu grupo kaj eble neniu individuo...

Renato bone kondukis la diskuton pri paco. Estas ankaŭ israelanoj, kiuj volas la pacon.

La tempo estis tro mallonga por tia diskuto. Same kiel en Belgio, kiam oni parolas pri la lingvaj, komunumaj kaj regionaj malfacilaĵoj... Plie mi iom



Renato kaj Tali diskutas pri Paco

nervoziĝis, kiam alilandanoj komencis prediki al mi, kion fari pri belgaj aferoj. Do, mi konsilis al miaj aŭskultantoj persone iri kaj vidi tion, kio okazas en Palestino.

Poste mi prelegis pri la konstitucio de Belgio, sed ne havis sufiĉe da tempo, ĉar mi devis ankaŭ rakonti tion, kio ĵus okazis en Belgio. Estis vera ŝoko eĉ se iom antaŭe la polico kaptis la teroristan grupon en Verviers. La sekretaj servoj faras tiom, kiom ili povas, kaj jam evitigis aliajn atencojn. Oni kompreneble pli bone vidas la negativajn rezultojn ol la pozitivajn en tiuj aferoj. Mi rakontis, ke Bruselo estas la sidejo de la Eŭropa Unio, de la Nord-Atlantika Alianco inter aliaj. Pri la belga konstitucio mi klarigis, kiel ĝi estis originala. Oni nomis ĝin en la unuaj tempoj «kronita republiko» tial, ĉar la Senato estis elektita rekte kaj nerekte de la popolo (tiampe voĉdonantoj devis esti viroj, kiuj pagis 42 tiamajn frankojn, kiel imposto. Ekde 1893 ĉiuj ricevis voĉdonrajton, sed viroj, kiuj havis diplomon aŭ pagis impostojn, ricevis plian voĉon. Tiel, ekzemple, mia avo ricevis tri voĉojn. Tiu avantaĝo malaperis en 1919 post la unua mondmilito.

Originala estas ankaŭ la ŝtata divido. Belgio havas nun 7 parlamentojn, kaj unu el ili povas haltigi eŭropajn traktatojn. Tio okazis kun la flandra komunumo, kiu

vetois traktaton pri la protektado de lingvaj

malgrandaj komunumoj, kaj kelkajn semajnojn antaŭe la valona parlamento provizore vetois komercan traktaton kun Kanado. Jaser Arafat montris la belgan konstitucion kiel ekzemplon por solvi la rilatojn inter Palestino kaj Israelo. Oni ridetis en Belgio: ĉu estos arablingva kaj hebrelingva komunumoj (respondecaj pri kulturo, instruado kaj personaj servoj)? Ĉu konstitucie la religioj estos egalaj? Kio restos federacia kaj kio estos regiona (do respondeca pri ekonomio, dungado, medioprotektado kaj



Kajto: Ankie kaj Nanne

aliaj)? En Belgio estas 3 komunumoj (franclingva, nederlandlingva kaj germanlingva) kaj 3 regionoj (Valonio, Flandrio kaj Bruselo).

Gila gvidis interesan rondon. Okaze mi demandos ŝin, per kiuj kartoj ŝi ludigis la homojn en tiu psikologia afero. Tio efike paroligas homojn, kaj komunikigas ilin. Vespere ni ĝuis la belan kantadon de Ankie kaj Nanne kaj aliaj.



La tagon poste Amri kondukis nin tra Jafo. Tio estis interesa promenado. Lia riĉa komentado donis koloron al tiu vizito. Ni iris ĝis la preĝejo de Sankta Petro. Tiam estis servo en la franca de nigrahaŭta pastro. Estis ankaŭ multaj nigrahaŭtaj paroĥanoj. La stilo estis pli rekta ol ĉe ni. Mi bedaŭris ne povi paroli kun ili poste, ĉar nia grupo devis antaŭeniri. Ni vizitis la malnovan parton de Jafo. Mi ne sciis, ke Napoleono estis tiom kruela, kiam li decidis bruligi malsanulejon kun francaj soldatoj.

Oni instruis nin en la kurso de historio dum nia gimnazia tempo, pri Napoleono, kiel granda ŝtatestro. Pri tiu parto de historio oni silentis.

Interesa estis la vizito de malnova domo. Ne nur pro la arto, sed ankaŭ pro la klarigoj. En la jaroj 1890 alvenis judoj al Jafo. Ili aĉetis terenojn, kaj kuraĝe laboris en ili. Multaj homoj en Eŭropo pensas pri la filmo “Exodus” kaj ne scias, ke multaj judoj venis al Israelo antaŭe.

En la lernejo de Jafo la kursoj estis donitaj en la franca por knaboj, kaj la hebrea por knabinoj.

Mi ne partoprenis la vesperan aranĝon, ĉar mi multe parolis kun ege interesa samideanino. Tio, kio min frapis, estas, ke ne estis ĵurnalistoj. Ni vere estis inter ni.

3. Postkongreso: Jerusalemo, Morta Maro

La tagon poste ni adiaŭis, kaj afabla samideano kondukis nin (min kun Karlo kaj Konĉi) al la bushaltejo. Mi estis surprizita vidi junulinon vestitan kiel soldato kaj portanta pafilon. Ŝi verŝajne revenis hejmen. Dum mia militservo oni devis lasi nian pafilon en la kazerno.

En la buso mi ankaŭ renkontis israelaninon, kiu flue parolis la francan. Ni haltis en Jerusalemo, kaj prenis taksion. Kiam ni eniris en la hotelon, Karlo konstatis, ke li forgesis sian monujon en la veturilo. Ni eliris por provi trovi ĝin. Apenaŭ elirintaj, ni vidis la taksiaŝoforon kurantan al ni, tenante la monujon en la mano. Estas ankoraŭ honestaj homoj.

En la hotelo la akceptisto ne povis trovi la mendon de Amri. Ni montris la retmesaĝojn ricevitaĵn, sed tio ne helpis. Daŭris tempon kaj necesis telefonaj vokoj por trovi solvon. Poste ni manĝis sur teraso en Jafo-strato, kaj sekve promenis en la malnova kvartalo de Jerusalemo. La vendejoj estis fermitaj, kaj estis preskaŭ neniuj en la stratoj. Mi volis montri al miaj amikoj la enirejon de la Sankta Sepulkro, sed mi ne povis trovi mian vojon pro la mallumo!

La tagon poste ni atendis Amri kaj Nava, sed ili malfruis, ĉar estis haltigitaj survoje pro trafikŝtopiĝoj. Fine ni vizitis la malnovan Jerusalemon, kaj ĝuis la klarigojn



Ankie kaj Konĉi flosas en la Morta Maro

de Amri. La islaman kvartalon mi jam vidis antaŭe, sed ankoraŭ lernis pliajn interesajn aferojn pri tiu parto de Jerusalemo. Sekve ni vizitis Kumran.

Poste ni banis en la Morta Maro, kaj por la una fojo en mia vivo mi estis 400 metrojn sub la marnivelo...!

Vespere Amri devis iri aĉeti manĝaĵojn en la apuda urbo. En la restoracio la sumo ne korespondis kun la antaŭe aranĝita prezo. Mi admiris la grandan paciencon de Amri. La restoracio vendis belgajn bierojn. Mi aĉetis brunan. Fine, ni revenis al la gastejo kun la manĝaĵo, kaj ĝuis post tio sur la teraso.

Prenus multan tempon por priskribi tion, kion ni faris poste. Sed vidi Masada valoris la penon, kaj trovi riveron en la dezerto estas neordinara afero. Ni tranoktis en Eilat.

4. Jordanio kaj Eilat

La vizito de Jordanio estis ankaŭ ege interesa. En la landlima oficejo ni devis enskribi nin sur preparita folio. Nelly (nia svislanda kunvojaĝantino) kaj mi skribis niajn informojn sur la sama paĝo. La doganoficistino nomis Nelly « your wife ». Do mi tuj iris kaj diris al ŝi: « Mi ne sciis, ke vi estas mia edzino ! » Ŝi tuj respondis : « Alta supergrado de Alzheimer! ». Ni prenis kolektivan taksion ĝis Wadi Rum.

La vojo al Wadi Rum havas belegajn pejzaĝojn. Mi tute ne bedaŭras tiun ekskurson. Ni povis vidi sur unuvoja linio trajnon similan al tiu, kiun ni povis vidi en la filmo "Lawrence de Arabio". Sur la lokomotivo flirtis turka



La grupo en Wadi Rum kun la beduena gvidanto

flago. Ni tranoktis en la dezerto de Wadi Rum. Mi ne povis imagi, kiom da belaĵoj montriĝas en dezerto.

La ŝoforo, kiu veturigis nin al Petra, ne ĉesis nomi Amri « My friend ». En la turisma enirejo al Petra okazis problemo. La turisma polico postulis, ke ni, grupo de 7 personoj, prenu oficialan ĉiĉeronon. Ni dividis la grupon je

du. Mi aŭdis poste, ke Amri parolis kun la poliestro. Ni do iris viziti tiun mirindan lokon. Konĉi supreniris la montaron pere de azeno. Ŝi montris egan kuraĝon por piede malsupreniri, 40 tagojn post operacio. Ni longe atendis Amri, Karlo kaj Nelly, kiuj iris al la pinto de la monto, kaj provis reveni pere de azenoj. Sed survoje ili devis atendi la finon de nokta spektaklo, kiu baris la vojon. Do, ni manĝis ĉirkaŭ la 11-a vespere.

La tagon poste ni forlasis Jordanion por iri al Eilat. Je la landlimo la doganistino suspektis, ke mi ion kaŝas en mia pantalono! Mi komentis al la germanoj en la germana, ĉu la sinjorino volas havi pli profundan ekzamenon. Ili ridegis, sed oni lasis min pasi. Mi devis ankaŭ esti parole kontrolata.

Bela blonda doganoficistino enketis min, kaj senkulpiĝis pro tiuj demandoj. Mi respondis, ke kompare kun la eksa GDR (komunista Germanio) ili estas anĝeloj!

Mi intencis subakvumi kun balonoj en la Ruĝa Maro, sed antaŭe mi devis respondi al medicina demandaro, kaj rezignis pri tio. Do mi restis por gardi la aferojn de miaj samvojaĝantoj.

Mi havis interesan konversacion kun juda franco, direktoro de alta lernejo pri la pritrakto de religiaj aferoj en lernejoj. Li estis ege sentema rilate la laikecon de lernejoj (malpermeso montri religiajn aferojn en lernejoj). Mi respondis, ke ĉe ni tio estas aplikata ĉe instruistoj, sed ne ĉe lernantoj. La oficiala instruado estas neŭtrala. Tiel dirite, 50% de la lernejoj estas katolikaj en Valonio, kaj 70% en Flandrio.

Post tio ni revenis al Tel-Aviv tra la dezerto. Amri estis tre laca, kaj Karlo ŝoforis parton de la vojo. Survoje ni vizitis la grandan krateron Ramon kaj la observatorion de Mitspe Ramon.



Georges kun Nelly en Petra

Proksime al Tel-Aviv Amri lasis nin ĉe la trajna stacidomo. Mi forlasis miajn samvojaĝantojn, iris ĝis la indikata stacidomo, kaj prenis taksion. La ŝoforo estis ĉagrenita pro la morto de « Prince ». Mi provis konsoli lin, dirante al li, ke 30 jarojn antaŭe mi havis la saman senton, kiam Dalida sin mortigis. Per ŝiaj kantoj ŝi akompanis 37 jarojn de mia vivo.... La centro de Tel-Aviv estis bele lumigita kaj viva. La ARCADIA-hotelo okupas kelkajn etaĝojn de alta konstruaĵo, kie troviĝas ankaŭ la franca konsulejo. Mi pasigis la postan tagon en Tel Aviv. La temperaturo estis bona (29°C), kaj estis malvarmeta vento.

Mi prenis dokumentojn en la turistoficejo, kaj komencis mian promenadon longe de la Allenby-strato. Ĉar estis la juda Pasko, la stratoj estis malplenaj, kaj estis agrable rigardi kaj foti konstruaĵojn, kaj interalie domojn en la Bauhaus-stilo. Mi sentis iom la etoson de la fino de la 60-aj kaj komenco de la 70-aj. Precipe en la etaj stratoj. Ĉio estis fermita, do, mi pluiris. Fine mi atingis lokon kun multaj homoj. Mi aŭdis kelkajn homojn parolantajn la francan. Kontraste kun Jerusalemo, kie mi pli aŭdis la anglan, kaj kun Eilat, kie mi renkontis homojn el Argentino, kiuj laboras tie kaj parolis la hispanan. Homoj, kiuj ne konas Israelon, pensas, ke estas tie nur judoj. Efektive estas diverserco: araboj, afrikanoj, same kiel eŭropanoj. Mi ne sentis streĉon inter tiuj komunumoj.

La reiro al Bruselo estis senproblema. Sed ne ĉio estis ankoraŭ en ordo ekster la flughaveno, kaj mi maltrafis la trajnon por Bruselo. La temperaturo estis ĉirkaŭ 5 gradoj vespere, kaj mi havis preskaŭ tuj malvarmumon. Malfrue vespere mi estis en Charleroi.

Nun ni estas en la vintro kun -5 gradoj, kaj mi strebas reiri al Israelo ne nur pro la vetero....

Universala Kongreso en Nitra

Jael Ŝelaĥ

Saluton,

Mi estas Jaela. Ĉi-jare mi partoprenis la Universalan Kongreson en Slovakio. La Universala Kongreso okazis en la urbo Nitra en okcidenta Slovakio. La kongresa temo estis: *Socia justeco — lingva*

justeco. Centoj da homoj el dekoj da landoj diskutis plurajn temojn en unusola lingvo. Entute partoprenis pli ol 1260 personoj el 60 landoj.

Dum la kongresa semajno ni ĉiuj povis paroli, ridi, diskuti, ekskursi, manĝi kune, ĝui prelegojn, muzikon, arton, babiladon, kaj ĉion en Esperanto... Tiuj tagoj estis belaj kaj agrablaj.

La Kongreso estis tre sukcesa, en ĉiu temo kaj angulo oni povis vidi, kiom la organizantoj investis, por ke ĉio estu tiel sukcesa.

Mi estis tre impresita vidi en la lokoj, kiujn mi vizitis en Nitra, en la najbareco de la Kongreso kaj en la urbocentro, multajn afiŝojn kaj



reklamojn lige al la Kongreso. Mi estas, ke ĝi estis la unua Universala Kongreso en Slovakio.



Esperanto-flagoj flirtis en diversaj lokoj en la urbo. La kongresejo estis en la kampuso de la agrikultura universitato, kaj multaj koncertoj okazis en la ĉefa urba placo.

Mi estis tre kontenta partopreni la kongreson, renkonti multajn karajn geamikojn, kiujn mi renkontis en antaŭaj kongresoj. Mi ankaŭ ekkonis novajn karajn geamikojn el diversaj landoj.

Mi partoprenis en multaj ekskursoj, kvin kadre de la Universala Kongreso, kaj du organizitajn de la



ĉemizo), kiun mi renkontis en la UK en Gotenburgo en 2003. Tio estis la 13-a UK en kiu mi partoprenis. Ĝis la venontaj kongresoj...

gejunuloj, kiuj ankaŭ organizis piknikon en unu vespero.

En alia okazo mi gustumis naŭ specojn de slovaka vino, du el ili nomiĝis Esperanto.

Grupa foto dum kongresa ekskurso, kiun mi partoprenis. Eblas vidi mian karan amikinson Atsuko Akiyoshi el Japanio (kun la flava



Skripto de filmo pri Zamenhof 2017- parto I

Zaki Schiff

Tradukis kaj redaktis A. Wandel

En februaro 2017 la projekto ricevis subtenon de la fondaĵo Hodler'68.

"Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero" (Genezo 11: 1)
Dokumenta filmo pri Esperanto kaj Ludoviko Zamenhof.

Prezentado. Filmo, en kiu disvolviĝas unika rakonto, kiun oni ankoraŭ ne rakontis pri Ludoviko Zamenhof - fascina pola judo, kiu kredis, ke la mondo estas la hejmo de ĉiu homo - tiel kiel lia propra.

Direktora konstato - La inspiro por la Projekto

Kio estas la rilato inter L. L. Zamenhof kaj la 24 lingvoj, kiuj estas parolataj en la EK-landoj?

Dum 2017 la homoj ĉirkaŭ la mondo, kaj kompreneble lingvistoj, mencias la centjariĝon de la morto de Zamenhof. La inspiro por fari ĉi tiun filmon, kaj elmontri al la EK-civitanoj (ĉefe la junaj) la rakonton de la lingvo Esperanto - kaj ties kreinto Ludoviko Zamenhof, - venas de la fakto, ke en la kadro de la Eŭropa Komunumo estas 24 formale parolataj lingvoj. La ŝarĝo de tradukado de dokumentoj en la EK-institucioj estas enorma. La kono pri Zamenhof, lia vizio kaj lia planlingvo - povas kontribui al la starigo de estonta persona kaj kultura ponto inter homoj ĉie en la mondo kaj en la EK. Ĝi povas soni iom naiva, sed se estontaj generacioj de junaj civitanoj en la mondo ĝenerale kaj en la EK aparte majstros tiun lingvon, la zamenhofa vizio povas grade plenumiĝi.

Tiu ideo antaŭ nelonge iom efektiviĝis pro la "Brexit", la antaŭvidita decido de Britio eliri el la EK. La "Brexit" povas redukti la vastan rolon, kiun la angla ludas kiel la komuna lingvo inter EU-civitanoj. Tiu grava evento povas servi kiel vekiga voko por malnova-nova alternativo: regi Esperanton kiel unuiga lingvo inter personoj en la EK. Tiu filmo, kiu portretas la rakonton de Zamenhof, povas servi kiel modesta paŝo al atingo de tiu ĉi ekscita celo.

Punkto kiu verŝajne estos diskutita en la filmo estas: kio estas tiom speciala pri Esperanto, kiu povas allogi ambaŭ, EK-viziantojn kaj la pledantojn por Esperanto? Nu, ambaŭ havas universalan, kosmopolitikan, porpacan kaj humanisman vidpunkton, kiu povas movi homojn ie ajn. Kiel tia, filmo pri Zamenhof kaj lia bela planlingvo povas servi, por multaj personoj, kiel unua konatiĝo kun la ideoj de Zamenhof.

Unuflanke Zamenhof devenas de la juda-pola komunumo, kiu, tragike, ne plu ekzistas - kaj kiel tia, malmulte rekonata, memorata kaj estimata, estos probable kondamnita al forgeso. Aliflanke, Zamenhof, kiu estis kaj



ankoraŭ estas pinta humanisma figuro pro sia universala, kosmopolitika kaj porpaca vidpunktoj kaj pro lia unika planlingvo. Flegi lian kulturen heredaĵon estas grava kaj nobla celo.

En 2015-2016 mi estis okupata farante du unu-horajn dokumentajn filmojn, kiuj estis elsenditaj en Israelo en oktobro 2016. Ili estis ricevitaj tre bone, kaj nun vojaĝas tra la mondo montrataj en multaj festivaloj. Mi stumblis sur la temo Esperanto-Zamenhof farante la esploron por la filmoj - kaj tiuj estis la inspiroj:

1. "*Pli Viva ol Morta*" estas mia filmo pri Sigmund Freud kaj la daŭranta universala ĉeesto de lia heredaĵo. Farante la esploron por tiu filmo mi trovis tiun citaĵon, kiu metas Zamenhof sur la saman humanisman kaj universalan piedestalon kun Freud, Marx kaj Wittgenstein:

"Kiel Zamenhof, kiu serĉadis universalan lingvon, Freud serĉis universalan menson, Marx - universalan historian materiismon, kaj Wittgenstein - universalan logikon kaj matematikon. Kvar judoj, kiuj serĉadis universalecon". La filmo estas havebla ĉi tie:

Ligilo: <https://vimeo.com/178889081> Pasvorto: zakizaki

2. "Malsupren en la Profundan Malluman TTT-n" estas mia filmo pri la "darknet" (angle) - reto kiu ebligas al vi navigi anonime. La filmo diskutas la eblajn malutopiajn kaj la utopiajn eblecojn, kiuj povas evolui de la ekzisto de la darknet.

Dum la esplorklaboro por tiu filmo mi malkovris, ke kelkaj terminoj uzataj en la cifereca kodigo-mondo estas pruntitaj de Esperanto.

Ligilo: <https://vimeo.com/165291750> Pasvorto: dddw2016

Tial, konsiderante tiujn okazojn - la temo efektive logis min kapti ĝin per du manoj por fari filmon pri Zamenhof kaj pri la lingvo, kiun li kreis - Esperanto.

Taglibro de mia Frato - recenzo

Luiza Carol

*Recenzo pri "Taglibro de mia frato" de Chava Pressburger.
Aperis en "Juna Amiko" 3/2015. Ĝi adresiĝas al gejunuloj minimume 13 jaraĝaj. Tamen ĝi povus interesi ankaŭ plenkreskulojn.*

Elĉeĥigis Vlastimil Novobilský kaj Věra Novobilská.
Eldonejo Kava Pech, Dobřichovice (Ĉeĥio) 2005.

La libro kiun mi nun prezentas al vi adresiĝas al tre serioza kaj meditema junularo, samkiel al tre sentema kaj profundpensema plenkreska publiko. Ĝi fakte adresiĝas al legantoj tutkore interesiĝantaj pri historio, ne pro simpla scivolemo, sed pro la deziro pli bone kompreni nian nunan socion kaj helpi al ties plibonigo. Se antaŭ la legado vi ja havas almenaŭ ĝeneralajn konojn pri la dua mondmilito, tio ja helpos vin kompreni la socian etoson priskribitan en la libro.

Tiu legaĵo postulas de la leganto grandan kapablon imagi la sentojn kaj la internajn pensojn de adoleskanto, kiu vivis dum malfacilega tempo, kaj spertis tute neordinarajn sociajn travivaĵojn. En fikciaj rakontoj, la verkisto per sia arto igas vin sperti diversajn emociojn kaj kompreni la pensmanieron de la protagonisto. Sed tiu ĉi taglibro ne estas beletraĵo. Nek koscia historia atestilo ĝi estas, ĉar Petr GINZ, la aŭtoro de la taglibro, tute ne intencis publikigi ĝin iam ajn. Ĝuste tiu cirkonstanco faras la tekston de Petr tre sincera kaj fidinda dokumento.

Petr komencis verki tiun taglibron en Prago ĉirkaŭ la aĝo de 13 kaj duono, kaj interrompis ĝin je la aĝo de ĉirkaŭ 14 kaj duono, kiam oni sendis lin al Terezino. Dum la tuta jaro kiam li enigis mallongajn notojn en sian taglibron, Petr ne povis scii, ke lia vivo finiĝos je la aĝo de 16 en la mortigejo de Auschwitz, kien oni sendos lin pro tio, ke lia patro estis judo. Sed ni ja ekscias tion, legante la enkondukon verkitan fare de Chava PRESSBURGER, la pli juna fratino de Petr, kiu supervivis la militon.

Por bone kompreni la tekston de Petr, oni devas legi antaŭe tre atente la enkondukon kaj ankaŭ la rimarkojn de Chava Pressburger pri la taglibro de sia frato. Tiuj rimarkoj troviĝas post la taglibro mem kaj kompletigas ĝin.

Mi elektis por vi pensigan fragmenton el la notoj de Petr je la 4a de oktobro 1941:

“Posttagmeze mi estis ĉe familio Turn kaj en Troja. Estis planitaj konkursoj, sed ili ne efektiviĝis, ĉar estis tro malforta vento, kaj iu knabo (14-15- jaraĝa) ŝtonĵetis al ni. Survoje Turn estis haltigita de eble 11-jaraĝa malgranda knabo, kiu diris al li, ke ne estas permesite kontakti la judojn. Li diris ankaŭ, ke li bone konas la leĝojn, kaj ke li esploros lian nomon.”

Do, Petr vizitis amikon posttagmeze, kaj poste ili promenis kune en Troja (kvartalo de Prago). Ili planis partopreni konkursojn inter

memfaritaj ludil-ŝipetoj sur la rivero Vltava, sed ilia plano ne efektiviĝis pro la tro malforta vento kaj ankaŭ pro alia kialo: juna huligano ŝtonĵetis al Petr kaj al ties amiko. Poste aperis alia knabo, kies konduto ŝajnus tute nekomprenebla... se ni ne legus tre atente la rimarkojn de Chava Pressburger. Jen citaĵo el ties rimarkoj:

“Kiam poste okazis kelkaj solidarecaj manifestacioj flanke de la ĉeĥaj civitanoj [...] estis publikigita proklamo, ke ĉiu, kiu estos vidita kune kun judoj, aŭ eble eĉ esprimos publike sian simpatian rilate ilin, estos traktata same kiel judo mem: oni limigos al li nutraĵkuponojn, [ktp]”

Nun vi komprenas pli bone la antaŭan citaĵon el la taglibro, ĉu ne? Evidentiĝas, ke la malica malgranda knabo eksciis pri tiu punleĝo, kaj tial minacis la nejudan amikon de Petr. Sed kompreni la faktojn mem ne sufiĉas por profunda, matura legado. Dokumentoj el la pasinteco iĝas grandvaloraj por ni, nur kiam pere de ili ni sukcesas pli bone kompreni la nunon kaj pli efike pensi pri la estonteco. Kiel ni povas ligi al la nuno kaj al la estonteco la mallongajn notojn de Petr skribitajn en la aŭtuno de 1941?

Petr ne plu vivas, sed kion pri la aliaj knaboj, kiujn li renkontis tiun tagon? Se ili vivas, ili estas en siaj okdekaj jaroj nun. Kiel vi supozas, ke Turn rememoras tiun periodon el sia vivo? El la rimarkoj de Chava Pressburger vi ekscios pri solidarecaj manifestacioj flanke de ĉeĥaj civitanoj, inter ili la laboristoj de ĉokoladfabriko en Moravio. Kiel vi supozas, ke Turn opinias pri tiuj manifestacioj? Kiel vi supozas, ke liaj gepatroj edukis lin, koncerne inter-etnajn rilatojn? Kiel vi supozas, ke li mem edukis poste siajn gefilojn kaj genepojn, koncerne inter-etnajn rilatojn?

Tiutempe, kiam televidoj, komputiloj kaj komputiloj ne ekzistis, la nombro de taglibroj estis multe pli granda ol nun, ĉar la homoj havis pli da tempo por skribi. Supozu do, ke ankaŭ la tiamaj du malicaj knaboj havintus siajn taglibrojn. Kiaj povintus esti iliaj komentoj pri la tiutagaj okazaĵoj? Por imagi ilian vidpunkton, vi devus unue pripensi, kiom ofte tiuj knaboj aŭdis fiajn ŝablonajn mensogojn pri aliaj etnoj, diskonigitajn pere de radio kaj ĵurnaloj... Se oni apenaŭ kontaktas realajn personojn de alia etno, oni facile povas kredi je ĉiusecaj fiaj kalumnioj, ree kaj ree eldiritaj en la ĉirkaŭaĵo... Kiel vi supozas, ke tiuj knaboj evoluis post la milito? Kion vi opinias pri la homa kapablo plibonigi sian propran

personecon? Kion vi opinias pri la rolo de edukado, kiam temas pri plibonigo de interhomaj rilatoj?

Kio estas “antaŭjuĝo”? Ĉu vi povas doni kelkajn ekzemplojn de gravaj sociaj antaŭjuĝoj, kiujn vi mem rimarkis dum via propra vivo? Ĉu vi jam renkontis en via ĉirkaŭaĵo antaŭjuĝojn koncerne Esperanton? Kiel vi provas neniigi tiujn antaŭjuĝojn?

Miaopinie, se vi volas serioze legi tiun libron, vi devos ĉiupaŝe dum la legado fari al vi tiajn demandojn. Tio povus ŝajni malfacila tasko. Sed kiu akceptos la defion, tiu multe maturiĝos dum la legado, kaj multe lernos pri la grandega rolo de edukado koncerne la interhomajn rilatojn.

Chava Pressburger priskribas kun granda amo kaj danko la familian edukadon ricevitan de ŝi kaj ŝia frato. Antaŭ la milito la vivo de la gefratoj ŝajnis gaja kaj senzorga. Ilia patro apartenis al juda familio, kaj ilia patrino al ĉeĥa familio, kio ebligis al Petr kaj Chava ricevi donacetojn kaj ĝui agrablajn tagojn okaze kaj de kristanaj kaj de judaj religiaj festoj, ĉe ambaŭ paroj de amantaj kaj amataj geavoj. La gepatroj estis esperantistoj kaj konatiĝis okaze de Esperanta kongreso. Petr kaj lia fratino estis denaskaj esperantistoj. Petr estis scivolema pri sciencoj kaj artoj, kaj ŝatis legi sciencfikciajn librojn, precipe romanojn de Jules Verne.

En tiu ĉi libro vi trovos ankaŭ fragmentojn el beletraĵoj verkitaj de Petr kaj kelkajn fotokopiojn pri liaj desegnoj. Unu el tiuj desegnoj vi povas vidi apude. Ĝi nomiĝas “Luna pejzaĝo”, kaj estis verŝajne inspirita de unu el la romanoj de Jules Verne.

Danke al tiu ĉi desegno oni malkovris la ĵurnalon de Petr Ginz en la jaro 2003, t.e. 62 jarojn post kiam Petr ĉesis enigi notojn en ĝin. La historio de tiu malkovro ja similas sciencfikcian romanon. La ĉefa okazaĵo kiu ebligis tiun eventon estis... la kosma vojaĝo de tiu ĉi desegno! Mi ne ŝercas. La originala “Luna pejzaĝo” de Petr ja vojaĝis per spacŝipo en 2003. Se vi scivolos pri detaloj, vi trovos ilin en la libro.



Teddy (Cvi) Lowenkopf, 1921-2016

A.Wandel



En februaro 2017 forpasis Teddy Lowenkopf, je la aĝo de 95. Li estis la plej aĝa e-isto en Israelo, postlasis 3 filinojn, 8 nepojn kaj 14 pranepojn. Lowenkopf naskiĝis en Transilvanio, kaj nomiĝis Teodoro, je la nomo de Herzl. Li studis en la rabena seminario en Budapeŝto dum 5 jaroj. Dum tiu epoko li lernis E-on, vizitis la E-klubojn en Budapeŝto kaj konatiĝis kun Kalocsay kaj Baghy. En 1940 li vizitis siajn gepatrojn en Rumanio, kaj la faŝisma reĝimo en Hungario malpermesis al li reveni al la seminario en Budapeŝto, paŝo kiu verŝajne savis lian vivon. Li restis en Rumanio, sed pro la kreskanta antisemitismo tie li decidis migri al Palestino. Li alvenis sur la ŝipo "Drian", kaj estis arestita de la britoj dum unu jaro en la prizona kampo por neleĝaj enmigrintoj en Atlit. Kiam li liberiĝis, li aliĝis al la kibuco Maagan, apud la Lago de Galileo. Li laboris en la potasa kompanio de la Morta Maro en Sodomo, poste en la elektra centralo en Naharajim, apud la rivero Jordano. Sekve li fariĝis la lignaĵisto de la kibuco Maagan, kaj post lia emeritiĝo li laboris kiel bibliotekisto en Bet Gordon, en la apuda kibuco Degania. Teddy estis tre talenta pri lingvoj. Hejme oni parolis la hungaran, en la lernejo li lernis la rumanan kaj la francan, en la rabena seminario la latinan kaj la germanan, kaj en Palestino la anglan. Sed liaj plej grandaj amoj estis Esperanto kaj la hebrea lingvo. La ĉi-lastan li aŭdis jam en la gepatra hejmo, kaj poste li fariĝis spertulo pri la hebrea gramatiko kaj ĝia elparolo.

Esperanton li eklernis kiel junulo kun siaj geamikoj en Budapeŝto, kaj fariĝis flua parolanto. Li korespondis kun multaj e-istoj el la tuta mondo, kaj havis grandan kolekton de E-libroj. Li kredis, ke E-o fariĝos interlingva ponto, kaj la fakton ke nuntempe la angla plenumas tiun rolon, li konsideris kiel historian maltrafon.



Kvankam li malofte partoprenis la kunvenojn de la e-istoj en Israelo, li havis fortan rilaton kun la israela E-movado. En la naŭdekaj jaroj li estis instruisto de la koresponda E-kurso en Israelo. En tiuj jaroj mi plurfoje vizitis lin en lia kibuco Maagan, okaze de vizitoj al mia fratino, kiu loĝas en apuda kibuco, Sde Eljahu.

En 2004 la Israela Kongreso (tiam nomata KIES -

Komuna Israela E-Semajnfino) gastis en lia kibuco, Gaaton (kovrilo de la marta n-ro de revuo Esperanto, 2004). Sekve mi plurfoje vizitis lin dum la ekskursoj al la lago de Galileo, kiujn mi ĉiĉeronas okaze de la Israela Kongreso. Lastfoje mi vizitis lin kun la antaŭkongresa ekskurso de la 7-a Azia Kongreso en 2013, kaj li, je la aĝo de 91, venis renkonti nin bicikle ĉe la kibuca enirejo. Li vigle babilis kun la eksterlandaj e-istoj, aparte kun la knabinoj, kaj ni faris komunan foton (IE158-159, p.23, <http://esperanto.org/il/dosieroj/ie158-159.pdf>).



La ekskursanoj kun Cvi Löwenkopf en kibuco Maagan

Kiel mi fariĝis adepto de Esperanto

Teddy Lowenkopf

Artikolo kiun verkis Teddy – estas afiŝita en la forumo "Tapuz", 18.2.2012.

Dum la somero de 1934, en aĝo de preskaŭ 13 jaroj, mi restadis en la nord-okcidenta rumania urbo Satu Mare. La filo de mia gastiganta familio altiris mian atenton al notlibro-formata broŝureto kun la rumanlingva titolo "Ŝlosilo de la lingvo Esperanto", en vitrino de libro-vendejo. Tio estis la t.n. Cefec-ŝlosilo. Mia amiko aĉetis ĝin kontraŭ 5 lejoj, kaj ni povis poste impresiĝi pri la praktika valoro de la proponata lingvo. Tri jarojn poste, kiel jam triajara lernanto en la Rabena Seminario en Budapeŝto, mi havis okazon denove aŭdi pri Esperanto. Tio okazis en kadro de t.n. memkleriga rondo. Unu el la lernantoj de pli alta klaso prelegis pri Esperanto. La ideo pri facila, belsona, logika, internacia lingvo fascinis kaj kaptis nian junan fantazion. Tiam mi estis studinta plurajn lingvojn: la francan, germanan, latinan, malnovgrekan, ioman aramean gramatikon, kaj memkompreneble la hungaran, rumanan kaj hebrean lingvojn. La unua - gepatra, la alia ŝtata, la tria - nia nacia lingvo.

Baldaŭ poste formiĝis grupo de lernantoj, kiuj serioze ekinteresiĝis pri la ebleco ellerni tiun lingvon. Ni akiris per komuna mono la lernolibron de Medgyesi, kaj transdonante ĝin de mano al mano, ene de malmultaj semajnoj ni jam posedis ĝin tiagrade, ke ni decidiĝis ekviziti Esperantan klubon. Dume ni praktikadis E-on inter ni, tiamaniere ke promenante surstrate, laŭkonsente dum difinita tempo ni parolis nur E-e. Laŭ mia scio, tiutempe [1937] funkciis en Budapeŝto du E-aj kluboj: unu "burĝa", kiun frekventis elstaraj samideanoj, tiutempe jam tutmonde konataj, kiel Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Ludoviko Tárkony k.a. La alia klubo estis laborista, ankaŭ ĝin ni vizitis unu aŭ du fojojn, ĝis iu bonvoleme avertis nin, ke ni prefere detenu nin de amikaj rilatoj kun socialistaj samideanoj, ĉar la duon-faŝista reĝimo suspektas ilin per simpatio al komunismo, kiu estis persekutita en la dummilita periodo. Mi persone havis duoblan kialon obei tiun konsilon - unue pro mia judeco, due pro mia fremda ŝtataneco, kaj malgraŭ mia simpatio al la laborista movado, mi ne emis endanĝerigi la daŭrigadon de miaj studoj. Kio altiris min persone al E-o, estis ne nur la

meritoj de la lingvo, sed ne malpli la amika, varma etoso, kiun ni renkontis en la klubejo ERA [Esperanto-Rondo Amika]. Kompreneble, ni tuj prezentis nin kiel lernantoj de la Juda Teologia Seminario. Tiam mi konstatis, ke esperantistoj estas homoj de pli nobla speco. Tion pruvis interalie Kálmán Kalocsay, ne nur elstara esperantista verkisto kaj poeto, unu el la plej grandaj post Zamenhof, sed ankaŭ senriproĉa, vera humanisto. Dum la plej ŝtormaj tempoj, plej kruelaj persekutoj (1944), Kalocsay ne hezitis savi la vivon de mia kolego, samideano kaj bona amiko, vivanta ankaŭ nun en Hungarujo, endanĝerigante sian propran vivon. Savado de judoj estis konsiderata kiel gravega krimo, dum ilia murdo - patriota ago. La sagokrucistoj [hungaraj nazioj] senceremonie, surloke murdadis la kristanajn kaŝintojn kune kun la judaj kaŝitoj.

Jen pro kio nestas profunde en mia koro la amo al la Internacia Lingvo Esperanto. Jen pro kio mi restos fidela al E-o ĝis mia lasta spiro.

Hebrea traduko de Doron Modan:

טדי לבנקופף מקיבוץ מעגן הוא זקן האספרנטיסטים בארץ, לפני כמה חודשים מלאו לו 90 שנה ועודו צלול ואנרגטי. אתמול שלח לרשימת תפוצה עליה אני נמנה את הטקסט הבא, ובינתיים קיבלתי ממנו רשות לפרסם אותו בפורום. חשבתי שזה יעניין את כולם.

כיצד נעשיתי חסיד שפת האספרנטו

בקיץ שנת 1934 בגיל קרוב ל-13 - שהיתי בחופשת קיץ בעיר סטו-מארה שבצפון רומניה - אצל משפחת רוט - שהיה להם בן בגילי - ואחותו באותו זמן שהתה בעיר מגורי הוריי, באורשובה שלחוף הדנובה - מול סרביה.

הבחור הסב את תשומת לבי אל חוברת בשפה הרומנית "מפתח שפת האספרנטו" בחלון ראוה של חנות ספרים. היה זה "מפתח לשפה הבינלאומית".. ידידי רכש את החוברת תמורת 5 ליי. - ואז יכולנו להתרשם מהערך המעשי של השפה המוצעת.

כעבור 3 שנים, בהיותי תלמיד שנה שלישית בבית המדרש לרבנים בבודפשט - הייתה

לי הזדמנות לשמוע אודות האספרנטו. היה זה במסגרת החוג להשכלה עצמית. אחד התלמידים מהכיתות הגבוהות הרצה על סגולות האספרנטו. הרעיון של שפה בינלאומית קלה - הגיונית ויפת-צליל - המצאת בן עמנו אליעזר זמנהוף הקסים אותי. אז כבר למדתי כמה שפות זרות - נוסף להונגרית ורומנית - - צרפתית, גרמנית, לטינית, יוונית עתיקה, דקדוק השפה הארמית, וכמובן את השפה ההונגרית, רומנית ועברית. הראשונה - שפת אם, השנייה - שפת המדינה בה גרנו, השלישית - לשונון הלאומית.

תוך זמן קצר קבוצת תלמידים החלה להתעניין באופן רציני על האפשרות ללמוד את השפה הבינלאומית. רכשנו את ספר הלימוד של מדגשי שעבר מיד ליד - ותוך שבועות מועטים הגענו לשליטה בשפה ברמה שאפשרה לנו לבקר במועדון דוברי אספרנטו. בינינו לבין עצמנו הרבינו לדבר אספרנטו לעיתים מזומנות. עד כמה שזכור לי - באותה עת ב-1937 פעלו בבודפשט שני מועדוני אספרנטו - אחד "בורגני" בו ביקרו חברים בעלי רמת ידיעות מעולה - ששמם היה מוכר גם מעבר לגבולות המדינה - קלמן קלוצ'אי ויוליו באגי, לודוביקו טארקון ועוד.

המועדון השני היה מקורב לתנועת הפועלים, גם שם ביקרנו פעמיים - אך "בעלי רצון טוב" הזהירו אותנו שמוטב לנו להימנע מקשרים עם אנשים השייכים לתנועות סוציאליסטיות - כי המשטר הפשיסטי-למחצה עלול לחשוש בנו באהדה לקומוניזם - שנרדף באותה תקופה. לי אישית היו שתי סיבות להישמע לאזהרה, ראשית בשל יהדותי - שנית בגלל היותי אזרח רומני - ולמרות אהדתי אל תנועת הפועלים, חששתי לסכן את המשך לימודי.

מה שקירב אותי אל האספרנטו - זה לא רק סגולותיה של השפה - אלא בעיקר קבלת הפנים החמה לה זכינו במועדון - שרוב מבקריו לא היו יהודים. כמובן, מיד הצגנו עצמנו כתלמידי בית המדרש לרבנים. אז הגענו לכלל הכרה, שחסידי האספרנטו הנם אנשים נאורים - אצילי נפש - בתקופה בה השלטונות חוקקו חוקי אפליה אנטישמיים בהשפעת גרמניה הנאצית.

אחד האספרנטיסטים הבולטים היה קלמן קלוצ'אי, שבתקופת השואה הסתיר בביתו את ידידי אימרה בלאו - במחיר סיכון חייו - כי אנשי "צלב החץ" היו נוקמים לא רק ביהודים שמקום מחבואם התגלה - אלא גם בנותני המקלט. הצלת יהודים נחשבה עברה חמורה, ורדיפתם - מעשה פטריוטי. קלוצ'אי הנוצרי היה מוכן לקבל על עצמו את הסיכון - בסייעו ליהודים נרדפים.

מכל האמור לעיל בוודאי תבינו, מהי סיבת דבקותי בשפת אספרנטו ואהדתי לכל דובריה.

Memorlibro por Josef Šemer, 1950-2012

A.Wandel

Enkonduko de la dua eldono

Kvar jarojn post la ŝoka forpaso de Josi ni finfine eldonas tiun monumentan memorlibron. Ĝi komenciĝis de spontanea kolekto de la kondolenc-mesaĝoj el la tuta mondo, inunde alvenintaj tuj post la anonco de la neantendita forpaso de Josi. Aldoniĝis memoraĵoj verkitaj de liaj geamikoj por la memorvespero okazinta tri semajnojn poste en la Tel-Aviva Esperanto-klubo, kiun li gvidis dum multaj jaroj, kaj nun portas lian nomon. Iom post iom aldoniĝis pliaj materialoj pri kaj de Josi, kiujn mi kaj aliaj zorge kolektadis.

Mi kredas, ke tiu ĉi libro havas ankaŭ memstaran valoron, estante produkto de la Esperanto-komunumo (la multaj konatuloj kaj geamikoj de Josi tutmonde kaj en Israelo).

En la unua parto de la libro troviĝas memoraĵoj, nekrologoj kaj kondolencoj de la tuta mondo, privataj kaj en la gazetaro. La dua enhavas 50 artikolojn, kiujn verkis Josi dum kvar jardekoj. La tria parto estas plena kolekto de liaj famaj judaj ŝercoj kaj anekdotoj, kiujn li zorge kolektadis kaj sendadis dum pluraj jaroj, ĉiusemajne al kelkcentoj da “abonantoj” tutmonde.

La apuda bildo, kiun mi kaptis meze de lia prelego pri la hebrea lingvo dum la Internacia Festivalo en Germanio, plej bone transdonas la spiriton de Josi kaj lian entuziasmon: gvidanto, instruisto edukanto kaj... esperantisto. Same kiel dum sia profesia vivo, li estis talenta preleganto kaj estis plej feliĉa, kiam li instruis kaj gvidis diskutojn, aparte



dum Esperanto-renkontiĝoj kiel IJK, UK, ILEI, IF kaj la Israela Kongreso.

La apuda bildo, lia lasta Somerfina Renkontiĝo, simbole montras la rolon de Josi en la Israela Esperanto-movado: gvidanto, flagportanto, sed ĉiam inter la samideanoj.



Ĉiuj aprezis kaj amis lin, lian amikemon kaj dediĉon por Esperanto. Eble pro tio ni, liaj israelaj geamikoj kaj samideanoj, bezonis kvar jarojn por kuraĝi fine eldoni tiun ĉi memorlibron.

Fine mi volas danki al ĉiuj kontribuantoj, kaj aparte al miaj kunlaborantoj, kiuj investis multan tempon, por ke tiu ĉi verko estu kiel eble plej kompleta kaj belaspekta: Jehudit Epstein (grafiko), Eldad Salzman kaj Gabi Zeevi (provlegado) kaj Doron Modan (skanado de malnovaj artikoloj kaj fotoj). Mi esperas, ke la rezulto pravigas nian grandan laboron.

Tiu ĉi estas jam la dua eldono, ĉar de la unua ni faris nur limigitan kvanton por la UK en Nitra. En estas iom pli da artikoloj kaj fotoj.

Amri Wandel,
julio kaj decembro 2016

NDLR: Nun haveblas la dua eldono, ankaŭ en la katalogo de UEA: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9330

